

*M. Carr*

EMILE BOIRAC

Rektoro de la Dijona Universitato

---

# Plena Vortaro

## Esperanto = Esperanta

kaj

## Esperanto = Franca

---

UNUA PARTO



DIJON  
PRESEJO DARANTIERE  
65, STR. CHABOT-CHARNY

---

1909



Al mia kara kolego

Sr Cart. Alexandrovich,

Tutkon dedikita

Voiron

704.286-C.U.

**PLENA VORTARO**

**Esperanto=Esperanta**

kaj

**Esperanto=Franca**

PIRELLA GÖTTSCHE LOWE  
Advertising Agency  
100 Avenue of the Americas  
New York, N.Y. 10013  
Telephone: (212) 696-7000

EMILE BOIRAC

Rektoro de la Dijona Universitato

---

# Plena Vortaro

## Esperanto = Esperanta

kaj

## Esperanto = Franca

---

UNUA PARTO



DIJON

PRESEJO DARANTIERE

65, STR. CHABOT-CHARNY

---

1909

~~702288-C~~

704.266-C. Esp

EMILE BOIRAC

Leçons de la langue française

# Plena Vortaro

## Esperanto - Esperanta

### Esperanto-Franca

UNUJARTE



DIJON

LIBRAIRIE PARANETRE

15, rue de la République

1907

FRANCA

FRANCA

AL MIAJ SINDONAJ KUNLABORANTOJ

GESINJOROJ

FAUVART-BASTOUL

Tiu ĉi verko

Efektivigita nur per ilia konstanta helpo

Estu dediĉita

Kiel atesto de sincera dankeco.

E. B.

THE NATIONAL ANTHROPOLOGICAL ARCHIVES

WASHINGTON, D. C.

FIELD STATION

1912

EXPLORATION OF THE MOUNTAINS OF

THE MOUNTAINS OF

THE MOUNTAINS OF

THE MOUNTAINS OF



## ANTAŬPAROLO

---

La vera titolo de la verko, kiun ni, t. e. miaj kunlaborantoj kaj mi, prezentas hodiaŭ al la Esperantista publiko estus pli ĝuste: *Provo de Plena Vortaro Esperanto-esperanta*; ĉar ni ne povas pretendi tuj de la unua fojo trafi tiel malfacile atingeblan celon, kiel estus senmanka repertuaro de ĉiuj esperantistaj radikvortoj, troveblaj ne nur en la Esperanto-naciaj Vortaroj, tre maldikaj plej ofte kaj pli malpli similaj inter si, sed ankaŭ en la Vortaroj naciesperantaj, el kiuj kelkaj estas jam grandampleksaj, kaj sufiĉe diferencas unu de la alia, en la diversaj Teknikaj Vortaroj, kaj eĉ en la verkoj literaturaj, filozofiaj, sciencaj, k. t. p., kies nombro ĉiutage pligrandiĝas.

Ni do petas de niaj legantoj malseverecon kaj indulgemon, se ni plenumis nur tre malperfekte tiel vastan programon; sed ŝajnis al ni, ke tia repertuaro estas de nun, se ne plene efektivebla, almenaŭ utiliga, eĉ necesa; kaj pro tio ni kuraĝis entrepreni la taskon.

### I

En la unuaj tagoj de la vivo de Esperanto, la sola repertuaro de la uzeblaj radikvortoj estis la « Universala Vortaro », kombinita de la kreinto mem de la lingvo, Doktoro Zamenhof, tiamaniere ke ĝi povu taŭgi por ĉiuj bezonoj de la komuna interkompreniĝo; kaj la unuaj verkistoj penis por esprimi ĉiujn ideojn nur per la helpo de la radikoj entenataj en tiu vortaro. Sed ju pli la lingvo kaj la literaturo disvolviĝis, des pli enŝoviĝis kvazaŭ nesenteble kaj nevole novaj vortoj ordinare ĉerpitaj el la sama internacia fundo, el kiu jam ĉerpis D<sup>ro</sup> Zamenhof; kaj la Majstro mem, en siaj cirkuleroj, en la artikoloj de la tiama *Lingvo Internacia*, uzis tian liberecon enkonduki novajn vortojn. Aliparte, kiam estis verkata la unua Vortaro nacia-esperanta, t. e. la Vortaro Franca-esperanta, aperis por traduki multajn vortojn de lingvo, kiun kompreneble la laboro de grandnombraj centjaroj senfine komplikis, la neceso aldoni novajn radikojn al la esperanta radikaro; kaj de la Franca-esperanta Vortaro tiuj radikoj baldaŭ transplantigis en la Esperanto-francan kaj ĝenerale en ĉiun Esperanto-nacian Vortaron. Same okazis pri la Germana-esperanta Vortaro; sed jam en tiu lasta okazo, oni komencis ekvidi, ke tia maniero procedi al la plimultigado de la esperanta radikaro ne estas tule sendanĝera. Enkondukante

novajn esperantajn vortojn okaze kaj pere de ia nacia Vortaro, ĉu franca, ĉu germana, k. t. p., oni preskaŭ neeviteble transportas en Esperanton radikojn ne sufiĉe internaciajn, sed kontraŭe nur rekoneblajn de la nacioj uzantaj tiun nacian Vortaron. Ni citos ekzemple el la Germana-esperanta Vortaro la vortojn bekeŝo (*Pekesche*), bovlo (*bowle*), bufro (*Puffer*), ĉirpi (*ĉirpen*), dreliko (*Drillich*), felpo (*Felbel*), haŭbizo (*Haufbitze*), hufo (*Huf*), juŝto (*Juchten*), junkro (*Junker*); kaŭri (*kauern*), kepro (*Koper*), kirli (*kirlen*), klingo (*Klinge*), kluki (*glucken*), knari (*knarren*), kvasto (*Quaste*), kveri (*girren*), lakmuso (*Lakmus*), mestizo (*Mestiŝe*), ornato (*Ornat*), panelo (*Pannel*), paviano (*Pavian*), provoso (*Profos*), pufo (*Puff*), refo (*Reff*), referato (*Referat*), regreso (*Regress*), remtero (*Remter*), sandro (*Zander*), staplo (*Stapel*), steveno (*Steven*), stople (*Stoppel*), ŝakri (*shachern*), ŝakto (*Schacht*), ŝeroj (*Schären*), ŝpico (*Spitŝ*), taŭgi (*ĉauŝen*), tiko (*Zwillich*), tindro (*Zinder*), vertago (*Zeckel*), vokto (*Vogt*) k. t. p. Komprenoble ni ne kontraŭparolas al ĉiuj cititaj radikoj: kelkaj povas esti tute rekomendindaj kaj definitive akceptindaj: sed oni komprenos, ke por Esperantisto ne germano, kiu ilin trovas en la Vortaro ĉu Esperanto-germana, ĉu Germana esperanta, ili estas tute nekompreneblaj; ĉar ili estas nur germanaj vortoj esperante vestitaj. Tial unu el la servoj, kiujn la Esperantistoj povas postuli de la Vortaroj esperanto-naciaj, t. e. utili por la komprenado kaj lernado de ia nacia lingvo, fariĝas neefektivigebla; ĉar se mi, Franco, ne sufiĉe komprenanta la germanan lingvon, trovas en ia teksto la vortojn, *Remter* aŭ *Schären* kaj serĉas ilin en la Germana-esperanta Vortaro, kian klarigon povos alporti al mi la esperantaj vortoj: *remtero* kaj *ŝeroj*? Do, por kompreni tiujn lastajn vortojn, Esperantisto bezonas koni antaŭe la germanan lingvon.

Sed tiu malutilo ankoraŭ pligraviĝis, ju pli multiĝis la ununaciaj-esperantaj Vortaroj sen responde alkonformiĝo de Vortaroj esperanto-diversnaciaj. Post la Franca kaj Germana Vortaroj aperis lastatempe Angla Vortaro de Rhodes, nova tre ampleksa Vortaro Franca de Presa Societo, kaj parto de la tiel nomita « *Grand Dictionnaire* » (Granda Vortaro), ankaŭ Vortaro Rusa; kaj en ĉiuj eloviĝis kaj svarmis novaj vortoj tute nekompreneblaj por Esperantistoj ne poliglota; ĉar ili estas ĉu pure anglaj, ĉu pure francaj, ĉu pure rusaj vortoj kun esperanta finiĝo. Se ĉiuj vortaristoj agus same en ĉiuj landoj de la terglobo, baldaŭ ni havus, krom la komuna internacia Esperanto, staranta sur la fundamento de *Universala Vortaro*, tiom da diversaj naciaj Esperantetoj, kiom estas da naciesperantaj Vortaroj. Jen ekzemploj por pruvi, ke tiu danĝero ne estas nur hipoteza. En la Angla Vortaro de Rhodes, *backgammon* estas tradukita esperante BAKGAMENO; laŭ angla-franca vortaro, *backgammon* estas la ludo *trictrac*, kiu estas tradukita en la Franca Vortaro de la Presa Societo: TRIKTRAKO. En la Angla Vortaro, *bubble* estas aerglobeto, BOBELO, kaj en la Franca la responde *bulle* estas BLAZO, k. t. p., k. t. p. Por nomi la fondinton de unu el la ĉefaj Hindaj religioj, la Angla Vortaro havas « BUDEO », dum ni trovas en la Franca « Budhismo, Budhisto », kiu rilatas la formon « BUDHO » k. t. p., k. t. p.

Por eviti tiun bedaŭrindam diversecon, la precipa rimedo estas, laŭ nia opinio, starigi de nun la liston de la duoblaj aŭ trioblaj formoj troveblaj en la jam ekzistantaj Vortaroj, tiamaniere ke unuparte tiu diverseco almenaŭ ne pligrandiĝu en la estonteco pro la nesciado de novaj vortfaristoj, kaj ke aliparte ĝi povu esti forigata per zorga komparado de tiuj duoblaj aŭ trioblaj formoj kaj definitiva elekto de la pli tanga.

Tiun lastan laboron povas kompetente kaj aŭtoritate fari nur la Lingva Komitato sub la direkto de la Akademio; kaj tial oni ne miros, se ni penis kiel eble plej akurate noti ĉiujn duoblajn aŭ trioblajn formojn, ne elektante inter ili, sed nur en iaj okazoj montrante per speciala signo, kiu ŝajnas al ni persone forĵetinda aŭ pli malpli riproĉebla.

La sama danĝero pendas sur la Teknikaj aŭ Specialaj Vortaroj, kies nombro kredeble kreskos en la estonteco, kaj eble ĝi estas por ili multi pli grava ol por la komuna vortaro. Cetere ne ĉiam estas tre facile distingi teknikan kaj komunan vortaron, kaj pro tio ni allasis sendistinge en nian repertuaron ĉiujn radikojn, komunajn aŭ teknikajn, nur presante ilin per diversformaj literoj, ne sen ŝanceliĝo pri multaj el ili. Certe la aŭtoroj de la Angla kaj de la Franca Vortaroj ne intencis verki teknikajn vortarojn: tamen en la unua ni trovis vortojn kiel *abiogenezo*, *akantiaso*, *akantocefalo*, *akatalektiko*, *akciakatur*, *akajno*, *akolio*, *acino*, *akrodinio*, *akronika*, *adiabata*, *adurolo*, *agaragaro*, *agenezio*, *agnoteto* (?) *amielotrofio*, *anabrokismo* (?), *ankilostomo* kaj *ankilostomiazo*, *aratologio* (kies signifon ni povis neniel retrovi, kvankam esplorinte sufiĉe plenajn enciklopediojn), k. t. p., k. t. p.; en la dua ni trovis, krom multaj el la ĉi supre cititaj, la vortojn *amanito*, *amaŭrozo*, *amendamento*, *amentaceo*, *amikto*, *amido*, *amio*, *amorozo*, *amfibolo*, *amfibraĥo*, *amfiktioj*, *anakardo*, *analektoj*, *analemo*, *anamorfozo*, *anaforo*, *anastrofo*, *ankolio* (anstataŭ *akvilegio*), k. t. p., k. t. p. Tiamaniere per la naciesperantaj Vortaroj alfluas en la esperantan vortaron multego da vortoj, tute senregule kaj kvazaŭ hazarde alprenitaj el la diversaj teknikaj lingvaĵoj; kaj pri tia fakto ankaŭ ni devas atenti kaj zorgi, ke ĝi ne difektu la unuecon de la lingvo. Unu ekzemplo montros, ke tie ĉi ankaŭ estas necese kontroli la diversajn vortlibrojn unu per la alia, se ni ne volas fali en veran babelecon. La besto nomita france  *paresseux* , angle, *sloth*, kaj en la ambaŭ lingvoj *ai*, ricevas en Esperanto kvar diferencajn nomojn: t. e. en la Angla Vortaro, *aheo* kaj *tardigrado*, en la Franca *aheo* kaj *bradipo*; en la Teknika Vortaro de Verax, *akeo* kaj same *bradipo*: oni eble opinios, ke estas iom tro multe da nomoj por unu sola besto.

Fine ni havis ankaŭ la deziron enkonduki en nian radikaron ĉiujn novajn radikojn uzitajn de la plej aŭtoritataj verkistoj de la Esperantista literaturo, D<sup>ro</sup> Zamenhof, Grabowski, Kofman, Devjatnin, Kabe, k. t. p., eĉ citante la lokojn; sed bedaŭrinde ni devas konfesi, ke ni tre malkontentige plenumis tiun plej utilan sed ankaŭ plej malfacilan parton de nia entrepreno. Ne unu homo povas efektiviĝi tiun necesan kolektadon, sed nur anaro de multaj kaj nelacigeblaj kunlaborantaj. Ni faris nur unu paŝon sur la vojo, kiun espereble aliaj post ni traesploros. Sed ĉar ni renkontis en nia tuta laboro multajn malfacilaĵojn, kiuj povus esti evitataj al la estontaj laborantoj per sufiĉe simplaj aranĝoj, ni petas permeson elparoli tie ĉi kelkajn konsilojn por la verkontoj de novaj Vortaroj naciesperantaj.

Unue estus, laŭ nia opino, plej senutile, aŭ por pli ĝuste diri, malutile, se ili enkondukus vortojn ne efektive apartenantajn al ilia propra lingvo, sed okaze prunteprenitajn de ia tute diferenca lingvo, kiel ekz. en Vortaro Angla aŭ Franca vortojn arabajn, hinajn, japanajn, k. t. p. per kiuj ofte vojaĝantoj kolormiksaĉas la rakontojn pri siaj voĝaĵoj: apud tiaspecaj vortoj, kiel (ni citas el la Angla Vortaro lit B): *bakŝiŝo*, *baŝibazuko*, *batmano*, *begumo*, *bolaso*, *bulbulo*, k. t. p., ni metis la noteton (voj) t. e. *vojaĝoj*, kaj ofte ankaŭ *demandan punkton*, kio signifas: ĉu

estas utile havi tiajn vortojn en Esperanta Vortaro, aŭ ĉu ne estus preferinde lasi ilin en ilia nacia formo? — Same estus pli bone, laŭ nia opinio, ne enkonduki vortojn apartenantajn efektive al la nacia lingvo de la vortaristoj sed ne havantajn signifon internacian, kiel ekz. pri la diversaj ludkartoj, manĝaĵoj, vestaĵoj, k. t. p. kiuj diferencas de unu lando al alia, kaj de unu jarcento aŭ eĉ de unu jaro al alia, k. ekz.: *buljoto*, *babao*, *bekeŝo*, k. t. p. Almenaŭ la vortaristoj devus enkonduki tiajn vortojn nur trovinte ilin jam uzitaj en la verkoj de kelkaj aŭtoroj, tute ne rudante ilin al Esperanto pro preteksto traduki mem per simpla transskribado vortojn de ilia nacia vortaro.

Due, se la estontaj aŭtoroj de naciesperantaj Vortaroj bonvolus ricevi niajn konsilojn, ni insiste petus ilin, ke ili montru per ia signo, ekz. per steleto, ĉiajn novajn radikvortojn kiujn ili prenas sur sin enkonduki, kiel faris la aŭtoroj de la Granda Vortaro Franca-esperanta (*Grand Dictionnaire français-esperanto*) en la jam aperintaj kajeroj de ilia verko. Estus ankaŭ laŭdinda kutimo aldoni en la fino tabelon de tiuj novaj radikoj, kiel faris almenaŭ parte la aŭtoro de la Angla-esperanta Vortaro (Rhodes).

Al la aŭtoroj de Teknikaj Vortaroj au Terminaroj ni faros ankaŭ tiun lastan peton; kaj plie, se iliaj verkoj ne estos ordigitaj laŭ alfabeto ordo (kiel ekz. la *Marista Terminaro*, de S<sup>ro</sup> Rollet de Lisle, la *Anatomia Vortaro*, de S<sup>ro</sup> D<sup>ro</sup> Bouchard, la *Muzika Terminaro* de S<sup>ro</sup> De Mesnil, la *Matematika Terminaro* de S<sup>ro</sup> Bricard, k. t. p.), ni insiste petos ilin, ke ili aldonu alfabetan liston de ĉiuj novaj terminoj, ne lasante al iu alia taskon por ili tre facile plenumeban; ĉar per tiu remedo ili ne nur faciligos mirinde la laboron de la estontaj plenvortaristoj, sed ankaŭ faros mem siajn verkojn dekoble pli utiligeblaj por ĉiuj legontoj kaj uzontoj.

Ni volonte turnus nin kun la sama peto al ĉiuj gazetistoj kaj kritikistoj, kiuj ekzemple de S<sup>ro</sup> Boulet kaj de la *Lingvo Internacia*, publikigas liston de novaj vortradikoj rimarkitaj en la plej freŝdataj verkoj ĉu de D<sup>ro</sup> Zamenhof, ĉu de aliaj eminentaj literaturistoj, Kabe, Grabowski, k. t. p. Plej ofte ili citas tiujn vortojn iom hazarde, kiel ili renkontis ilin de paĝo al paĝo en sia tralegado. Ne estus por ili tre granda laboro, kaj estus por la publiko kaj por la estontaj vortaristoj grandega servo, se ili zorgus ordigi siajn eltrovaĵojn laŭ alfabeto ordo.

Fine, se ni ne timus ŝajni tro postulemaj, ni dirus ankaŭ al ĉiuj verkistoj: « Ĉu tio tre ĝenus vinatentigi iamaniere la legantojn pri ĉiu nova vortradiko, kiun vi deziras kaj provos enkonduki en la komunan uzon? Tion ĉi vi povus tre oportune fari, ĉu (kiel faris S<sup>ro</sup> Sentis en *Urso en montoj*) signante per noteto malsupre de la paĝo la novan vortradikon, kies signifon kaj devenon vi montrus, ĉu aldonante en fino de la libro liston de ĉiuj vortradikoj de vi enkondukitaj kun mallonga traduko nacia aŭ klarigo esperanta. Almenaŭ, se la lastaj remedoj ŝajnas tro penigaj, estus bone distingi tiajn vortojn per speciala marko, k. ekz. steleto aŭ kursivaj presliteroj, k. t. p.

Nur, kiam la agado de tiuj aŭ similaj procedoj fariĝos ĝenerala kaj konstanta kutimo en la Esperanta verkistaro, nur tiam la Lingva Komitato povos efike plenumi la oficon al ĝi truditan de la Esperantistoj, t. e. kontroli kaj reguligi la evoluadon de la lingvo.

Manke de tia helpo, ni certe preterlasis multajn vortradikojn tre interesajn kaj utilajn; sed eble ni povos ilin restarigi en estontaj eldonoj de la Vortaro, se la publiko montros al ni, ke ĝi aprobas nian laboron.

II

Pri la traduko aŭ klarigo de la radikoj, ni penis atingi kiel eble plej altan gradon de klareco uzante tamen kiel eble plej malgrandan nombron da vortoj ; sed ni plene konscias, ke laŭ tiu rilato ni restis ankaŭ tre malproksime de la celo. Nia sola senkulpigo estas, ke ni provis unuaj fari ion ne ankoraŭ provitan. Tiuj pli bone faros, kiuj venos poste.

Eble oni miros, ke en Vortaro Esperanto-esperanta, do esence internacia, ni aldonis tamen francan, do nacian, tradukon al la internacia aŭ esperanta traduko. Tion ĉi ni decidis fari pro la jenaj kaŭzoj.

Unue, ni deziris, ke nia Vortaro, krom ĝia internacia utiligebleco, povu ankaŭ servi por la disvastigo de Esperanto inter niaj samlandanoj t. e. en Francujo kaj samtempe por la disvastigo de Franca lingvo inter niaj alilandaj samideanoj t. e. en la tuta mondo. La Francaj Esperantistoj ricevis ofte de siaj samlandanoj la riproĉon, ke, klopodante por la disvastigo de Esperanto, ili rekte laboras kontraŭ Francujo, kies lingvo povas rajte pretendi la oficon de universala interkomunikilo, kaj ke ili estas do malamikoj de sia propra patrujo. Sed la ofico, kiun povas rajte pretendi la franca lingvo ekster Francujo, tute diferencas de la rolo celata kaj jam parte plenumita de Esperanto kiel internacia helplingvaĵo. Eĉ se Esperanto estus fariĝinta la dua lingvo de ĉiu homo sur la tuta terglobo, restus ankaŭ ce ĉiuj kleruloj, ĉe ĉiuj amantoj de alta civiliziteco, la deziro konatiĝi kun la franca lingvo, ne por uzi ĝin kiel rimedon por internaciaj rilatoj, sed por ĝui ĝin kiel esprimon de unu el la plej belaj naciaj spiritoj en la homaro t. e. la spirito mem de Francujo. Pli vere, en tiu hipotezo, la nombro de aspirantoj al Franca kulturo senmezure pligrandiĝus en ĉiuj partoj de la mondo, ĉar ĉiuj homoj, al kia ajn nacio ili apartenus, povus havi dank'al Esperanto mirindajn faciligojn por lerni la lingvon kaj esplori la literaturon francan. Tion ĉi mi jam klarigis en mia antaŭparolo al la *Esperantista Gramatiko de Franca Lingvo* verkita de S<sup>ro</sup> Boulet; kaj pro tio ĉi ankaŭ mi aldonis al la jena Vortaro Esperanto-esperanta tradukaron francan, tiamaniere ke ĝi povu utili al la tuta internacia Esperantistaro por la lernado de nia nacia franca lingvo.

Cetere ni estus tre feliĉaj, se nia ekzemplo estus imitata de niaj alilandaj samideanoj, t. e. se aperus same en Germanujo Plena Vortaro Esperanto-esperanta kun tradukaro germana, en Anglujo kun tradukaro angla, en Italujo kun tradukaro itala k. t. p., k. t. p. La aranĝo, kiun ni elektis por tiu ĉi verko laŭ tri kolonoj, unu havanta la vortradikojn esperantajn, la dua la klarigojn en Esperanto, la tria la tradukojn en Franca lingvo, tre faciligus kredeble tiun plivastigon de nia ellaboraĵo; ĉar sufiĉus, restigante sen ŝanĝo la du unuajn kolonojn, anstataŭigi en la tria la francan tradukaron per angla, germana, itala, k. t. p.

III

Laŭ la metodo kaj ekzemplo de D<sup>ro</sup> Zamenhof en *Universala Vortaro* ni allasis en nia Plena Vortaro ne nur la radikvortojn sed ankaŭ la finiĝojn kaj afiksojn. Pri tiuj ĉi lastaj ne estos senutile prezenti kelkajn rimarkojn.

Kompreneble oni trovos tie ĉi la tutan afiksaron elpensitan de la Majstro ; kaj ni penis klarigi kiel eble plej precize la signifon kaj oficon de ĉiu afikso en ĝia alfabeto loko. Sed ŝajnas al ni, he por plene kompreni tiun ĉefan parton de la Zamenhofa kreaĵo, oni devas konsideri la afiksojn ne aparte unu de la alia sed kontraŭe laŭ iliaj interrilatoj kaj kvazaŭ membrojn de unu nedividebla tutaĵo.

Laŭ nia opinio, oni povas distingi inter ili du grandajn kategoriojn. Unuflanke estas *universalaj* afiksoj, kiuj povas kuniĝi kun ĉiuspecaj radikoj, verbaj, substantivaj aŭ adjektivaj, kaj povas same naski ĉiuspecajn vortojn derivitajn, verbojn, substantivojn aŭ adjektivojn. Aliflanke estas pli malpli *specialaj* afiksoj, kiuj kuniĝas prefere aŭ eĉ ekskluzive kun unu speco de radikoj, ĉu verbaj, ĉu substantivaj, ĉu adjektivaj, kaj naskas, almenaŭ senpere kaj primitive, nur unu specon de vortoj derivitaj, ĉu verbojn, ĉu substantivojn, ĉu adjektivojn.

Kiel oni vidas, ni starigas kiel esencan principon de Esperanto la specifikan diversecon de ĝiaj radikoj. Tiu principo ŝajnas unuavide kontraŭa al ia cirkonstanco, ke *Universala Vortaro* entenas krudajn radikojn sen finiĝoj kaj sekve sen gramatikaj diferencigoj; de kio oni eble povus konkludi, ke ili estas per si mem indiferentaj al ĉiu gramatika signifo, ke ili estas gramatike neŭtralaj, kaj ke sekve ili estas kapablaj vesti kun egala facileco ĉiujn gramatikajn diferencigojn, ĉu verbajn, ĉu substantivajn, ĉu adjektivajn. Sed tiu cirkonstanco venas nur de tio, ke *Universala Vortaro* estas antaŭ ĉio difinita por faciligi al neesperantistoj la tujan analizon kaj komprenon de esperantistaj tekstoj; kaj oni povas nenion konkludi de tio pri la efektiva strukturo de la lingvo. Estus facile montri, ke la radikoj de *Universala Vortaro* regule dispartigas en diferencajn kategoriojn t. e. verbajn, substantivajn, adjektivajn, k. t. p., kiel oni povas konstati per la diversnaciaj tradukoj de ĉiu el ili, kaj kiel cetere postulas la naturo mem de la realaĵoj kaj de la homa penso. La principo de la specifika diverseco de la radikoj estas pozitiva, eksperimenta fakto, multe pli grava ol la simple teoria kaj subjektiva regulo (ne principo) de returnbleco, kiun kelkaj malprave pretendis kontraŭstarigi al ĝi.

La *universalaj* afiksoj en Esperanto estas kvar, kiuj servas ĉu por altigi, ĉu por malaltigi ian econ, agon, estaĵon ĝis la plej ekstrema grado, ĉu eĉ por maligi kaj austataŭi ĝin per io kontraŭa, ĉu por aludi ian ajn rilaton kun ĝi.

Ili estas la sufiksoj *eg*, plejgrandiga; *et*, malplejgrandiga; la prefikso *mal*, inversiga; kaj fine la sufikso *um*, sen difinita senco. Ekzemple: *varmega*, *varmeta*, *malvarma*, *fermeti*, *fermegi*, *malfermi*; *orumi*, *columo*, *proksimuma*, k. t. p.

Oni povos ankaŭ meti en tiun klason la novan sufikson *aĉ*, kiu estas kvazaŭ *morale* malplej-

grandiga, kaj aldonas malŝatan nuancon al ĉiuspeca radiko, kun kiu oni kombinas ĝin : *domaĉo, obstinaĉa, ridaĉi*, k. t. p. ; kaj oni povus teorie imagi sufikson *morale* plejgrandigan, t. e. aproban, laŭdan, k. t. p. ; sed tiu sufikso saĝnas praktike senutila, ĉar oni renkontas ĝin en preskaŭ nenia lingvo (komparu tamen en la franca lingvo : *grand, grandiose*). Aliparte la adverbo *ne*, la prepozicio *sen*, uzataj kiel prefiksoj, ludas rolon tute kompareblan al tiu de la afikso *mal* (komparu *neutila, senutila, malutila*).

La *specialaj* afiksoj dividiĝas nature en tri specojn : 1<sup>o</sup> *verabaj*, t. e. naskantaj unualoke kaj senpere verbojn (kaj ankaŭ sed ne senescepte. kuniĝantaj prefere kun verbaj radikoj); 2<sup>o</sup> *adjektivaj* t. e. naskantaj unualoke kaj senpere adjektivojn ; 3<sup>o</sup> *substantivaj* t. e. naskantaj unualoke kaj senpere substantivojn.

La unua klaso entenas la tri sufiksojn : *ad, ig kaj iĝ*.— Pri « *ad* » oni povas rimarki, ke ĝi kuniĝas, ĉu kun verbaj ĉu kun nomaj, neniam kun adjektivaj radikoj. Kiam ĝi kuniĝas kun verbaj radikoj, ĝi naskas derivitajn verbojn, kiuj aldonas al la senco de la primitiva verbo nuancon de ripeto, daŭro, kutimo : ekz : *kanti, kantadi; pafi, pafadi; vivi, vivadi*, k. t. p. Kiam ĝi kuniĝas kun nomaj radikoj, oni povas dubi, ĉu ĝi naskas unualoke verbojn (kies signifo ne multe diferencus de la verboj senpere derivitaj de la tiuj samaj radikoj : *kroni, kronadi, tamburi, tamburadi*, k. t. p.) aŭ ĉu ĝi ne naskas pli ĝuste nomojn verbajn : t. e. ĉu ĝi ne aldonas al la primitivaj substantivoj novan sencon de agado : *krono, kronado; tamburo, tamburado*, k. t. p. Sed ĉiumaniere la sufikso *ad* havas esencaŭ rilaton kun verba ideo.

La sufiksoj *ig kaj iĝ* kuniĝas kun substantivaj kaj adjektivaj radikoj por naski derivitajn vortojn; kaj tio ĉi enhavas nenan malfacilaĵon, kiel ekz : *ŝtonigi, ŝtoniĝi; virigi, viriĝi; paligi, paliĝi; fortigi, fortiĝi*; k. t. p. Sed la afero estas iom pli malfacila, kiam la kuniĝo estas kun verbaj radikoj; kiel ekz : *venigi, faligi, dormigi, fariĝi, kantigi; veniĝi, faliĝi, dormiĝi, fariĝi, kantiĝi*, k. t. p. Ni ne povas tie ĉi diskuti detale la demandon; sed ni nur atentigos nian legantojn pri la neceseco uzi tiujn du sufiksojn, (kiel cetere ĉiujn sufiksojn) nur en okazo de efektiva bezono. Tre ofte, (precipe, ŝajnas al ni, en la britaj esperantistaj verkoj) la formoj kun *ig kaj iĝ* anstataŭas tute senutile kaj eĉ malutile la simplajn formojn : oni ne vekas, oni *vekiĝas* iun; io ne estas naskita, sed *naskiĝita*, k. t. p. Same oni *haltiĝas, droniĝas*, k. t. p. anstataŭ *halti, droni* k. t. p.

Al tiuj tri sufiksoj oni proponis de longa tempo, precipe inter la sciencistoj kaj teknikistoj, aldoni novajn sufiksojn samspecajn t. e. verbajn, por devenigi pli precize verbojn de substantivaj radikoj. Ekz : *iĝ* antataŭ *um* aŭ simpla *i* : *elektriĝi, oriĝi, argentiĝi*, k. t. p. Sed ŝajnas, ke en la komuna lingvo, kiu ne bezonas matematikan precizecon, tiaj sufiksoj estas ŝarĝo pli ol helpo. Oni ne uzas razilon por tranĉi lignon.

La afiksoj *adjektivaj* estas *ebl, em, ind*, kiuj kuniĝas ekskluzive kun verboj, ekz : *kredebla, kredema, kredinda; videbla, videma, vidinda*, k. t. p.

La unua prezentas sencon pasivan kaj signifas : kiun oni povas kredi, vidi, k. t. p. aŭ kiu povas esti kredata, vidata, k. t. p. Sekve ĝi povas kombiniĝi nur kun aktivaj verbradikoj : formoj kiel : *estebla, povebla, vivebla, mortebla*, havas nenan signifjon (nur se oni aktivigas okaze kelkajn el tiuj verboj. ekz. se *vivebla* signifas : ne, kiu povas vivi, sed, kiun oni povas vivi ;

*tia vivo ne estas vivebla*). La aktiva sufikso responde al *abl* ne ekzistas en Esperanto: oni ĝis nun uzis anstataŭe, ĉu la radikojn *pov. kapabl*, kiel ekz: *vivopova, pagokapabla*, ĉu la sufikson *em*, kiam la diferenco inter kapablo kaj inklino ŝajnas negrava kaj neatentinda, kiel ekz: *mortema, brulema*, ĉu la simplan finiĝon *a*, kiel ekz: *instrua, nutra* k. t. p. — Oni tamen proponis, precipe inter filozofoj kaj sciencistoj, enkonduki novan ŝufikson *iv* kun tiu speciala senco: ekz: *voliva, sentiva, aŭdiva, vidiva*, k. t. p. signifus kapabla voli, senti, aŭdi, vidi, k. t. p. kaj naskus la abstraktajn nomojn: *voliveco, sentiveco, aŭdiveco, vidiveco*, k.t.p. kiujn ŝajnas bezoni la filozofio kaj naturaj sciencoj.

El la du ceteraj *id* kaj *ind*, la unua prezentas sencon aktivan kaj respondas al la proponita *iv*; sed ĝi signifas pli ol simplan povon aŭ kapablon t. e. efektivan inklino, « tendencan », tiel ke « mortema » laŭvorte estas ne nur « kiu povas morti » sed eĉ « kiu celas, deziras, volas morti. » La dua « *ind* » respondas al « *abl* » almenaŭ en tio, ke ĝi havas ankaŭ sencon pasivan. « Laŭdinda, kredinda » signifas « kiu meritas, ke oni laŭdu, kredu ĝin » aŭ kiu meritas esti laŭdata, kredata » k. t. p. — Ĉu oni povus doni al ĝi la sencon proksiman kaj analogan: « kiu devas esti », aŭ ĉu estos necese, kiel opinias kelkaj aŭtoroj, enkonduki novan sufikson, kiel « *end* » por tiu ofico? Tio estas demando, kiun solvos nur la praktiko kaj komuna uzado. Ĝis nun oni uzis por esprimi la diritan sencon, krom « *ind* », ĉu la partecan finiĝon « *ot* » kiu aludas estontecon pli ĝuste ol devigecon, ĉu kummetitajn formojn kiel ekz: « La afero *estas por fari* tuj: mi *havas* tri leterojn *por skribi* antaŭ ol forveturi » k. t. p. Eble la rimedoj jam ekzistantaj sufiĉas sen aldono de nova komplikaĵo, des pli ke oni ne havas tre oftajn okazojn elparoli tiun iom specialan ideon.

Sed ĉu adjektivoj povas deveni nur el verboj? ĉu oni ne povus ankaŭ devenigi kelkajn el nomoj aŭ adjektivoj? Se ni konsideras la aferon el tute teoria vidpunkto, la respondo estas certe jesa: sed ni ne devas forgesi, ke lingvo estas des pli bona praktike, ju pli simpla kaj facila ĝi estas, sekve ke ĝi entenas kiel eble plej malgrandan nombron da afiksoj t. e. nur la necesegajn afiksojn. Teorie do oni povas elpensi afiksojn nomadejektivajn, kiel ekz, por signifi: ĉu apartenanta al io nomita, aŭ havanta en si ion nomitan, aŭ similtantan al ĝi, k. t. p.; sed la demando estas, ĉu tiuj pensnuancoj estas sufiĉe gravaj kaj renkontiĝas sufiĉe ofte en la parolado por ke oni nepre bezonu specialajn signojn por ili.

Pri la dua senco « apartenanta al io nomita » Esperanto ĝis nun devenigis adjektivojn de primitivaj substantivoj nur per sanĝo de finiĝoj: ekz: *reĝa palaco*, t. e. palaco de la reĝo; *suna lumo*, t. e. lumo de la suno; kaj neniam en la praktiko rezultis el tio ĉi eĉ la plej malgranda malfacilaĵo. Estas do tute senutile nuligi senfinan nombron da similaj formoj kiel *reĝa, suna*, k. t. p. kaj deklari ilin sensencaj kaj austataŭmeti formojn komplikajn, kiel *reĝala, sunala*, k. t. p. nur por kontentigi pure teoriajn postulojn.

Pri la dua senco « havanta en si aŭ sur si aŭ kun si ion nomitan », ŝajnas, ke oni proponis novan sufikson nur en okazo de « multhaveco ». Ekz. la sufikso « *oz* », jam de longe proponita kaj eĉ uzita de scienculoj kaj teknikistoj por tiu ofico, signifas ne « kiu havas simple ion nomitan, » ekzemple, florojn, fruktojn, branĉojn, kornojn, k. t. p. sed « kiu havas multe da ĝi. » Por esprimi la unuan el tiuj du sencoj, Esperanto uzas la radikojn *hav, port*, kiel ekz: *korn-*



*hava, fruktoporta* k. t. p. Eble oni povus ankaŭ uzi la prepozicion « *kun* » kiel prefikson, same kiel oni uzas la respondan prepozicion « *sen* ». Se oni diras : kreskaĵo *senflora*, besto *senkorna*, k. t. p., kial oni ne povus diri : kreskaĵo *kunflora*, besto *kunkorna* k. t. p.? — Por esprimi la duan sencon, Esperanto ĝis nun uzis same radikojn, *mult, plen, riĉ, don*, ĉu kiel prefikson, ekz : *multangula, multriska, multokula, multorela* k. t. p., ĉu kiel sufikson, ekz : *stelplena, herboriĉa, oledona*, k. t. p.

Sed povas esti, ke en kelkaj okazoj estus pli oportune havi specialan afikson pli malpezan ol tiuj kunmetitaj vortoj, kaj nenio malhelpas, ke la proponita sufikso « *oĝ* » plenumu tiun oficon, se tamen estas interkonsentite, ke ĝia uzado ne estos deviga kaj ke oni uzos ĝin nur en okazo de veza bezono, t. e. por signifi realan, materian multhavecon. Cetere tio ĉi estas afero, pri kiu sendube la Akademio konsiliĝos.

Pri la tria senco : « *similanta al io nomita* », la sciencistoj havas specialan sufikson « *id* » kaj « *oid* » aŭ « *ojd* », (precipe la zoologiistoj), kiel ekz : *antropojda, arboida*, k. t. p., sed tiu sufikso estas ekskluzive scienca kaj sajnas ja, ke ĝi ne povas defluiĝi en la komunan lingvon. Esperanto ĝis nun uzis kunmetitajn vortojn kun radikoj *simil, ŝajn*, kiel ekz : *homsimila, arbŝajna*, k. t. p.; aŭ devenigis adjektivojn de abstraktaj nomoj (kiuj estas mem kvazaŭ adjektivoj substantivigitaj), kiel ekz : *sapeca, oleeca* (kun la signifo; havanta econ de sapo, de oleo, kvankam ne estante sapo, oleo, sekve iel simila al sapo, oleo, k. t. p.). Ŝajnas, ke tiuj rimedoj povas sufiĉi sen enkonduko de nova balastero.

Same ne ŝajnas necese havi aldonan sufikson por devenigi adjektivojn el primitivaj adjektivoj. Efektive ĉiu adjektivo signifas : havantan ian econ aŭ kvaliton. Sed ĉiu ajn eco, konsiderata en la havanta ĝin subjekto, nur povas esti ĉu en meza, ĉu en plej alta, ĉu en malplejgranda grado, ĉu inversigita en la kontraŭan econ. Nu la universalaj afiksoj *eg, et, mal*, sufiĉas por plene esprimi tiujn nuancojn. Estas vere, ke en kelkaj lingvoj ekzistas sufikso por devenigi adjektivojn el aliaj adjektivoj (precipe signifantaj kolorojn). Ekz. france : *bleu, bleuâtre, rouge, rougeâtre*, k. t. p. Sed por tiel malvasta ofico ĉu estas necese enkonduki specialan sufikson? Ĉu ne sufiĉas uzi, kiel oni faris ĝin nun, la kunmetitajn formojn, *dubeblua, duberuĝa*, aŭ la universalan sufikson *et*, kiu ŝajnas al ni tute taŭga, ĉar la franca « *bleuâtre* » signifas : « kiu estas preskaŭ sed ne plene, ne vere blua, do *blueta* » ; tute same kiel « *varmeta* » signifas : « kiu estas preskaŭ sed ne plene, ne vere varma » ?

Nun ni transiras al la substantivaj afiksoj, kiuj povas ankaŭ dividiĝi en du klasojn :

1<sup>o</sup> Afiksoj por devenigi nomojn de aferoj, objektoj.

2<sup>o</sup> Afiksoj por devenigi nomojn de personoj (aŭ eĉ de bestoj).

En la unua klaso troviĝas :

1<sup>o</sup> Sufikso por substantivigi abstraktajn kvalitojn kaj fari el ili kvazaŭ nemateriajn aferojn, spiritajn objektojn : kaj tiu estas la sufikso *ec*, kiu kuniĝas prefere kun adjektivaj radikoj, kiel ekz : *boneco, varmece*, k. t. p, sed kiu povas ankaŭ kuniĝi kun substantivaj radikoj, kiel ekz : *homeco, dieco*, kaj eĉ kun verboj, kiel ekz : *videco, voleco* (precipe en kunmetitaj formoj : *klarvideco, senvoleco*, k. t. p.), kredeble en tiuj lastaj okazoj pere de la substantivaj kaj verbaj adjektivoj; *homa, dia, vida* (*klarvida*), *vola* (*senvola*), k. t. p. Tiu sufikso, kiel oni vidas, estas

kvazaŭ meza inter la ĵusantaŭaj kaj la sekvantaj. Ĝi servas por fari *abstraktajn* substantivojn.

2° Sufikso por nomi aferojn, objektojn (ĉu materiajn ĉu eĉ spiritajn, moralajn sed ĉiuokaze konsideratajn kiel ekzistantajn per si mem) laŭ unu el iliaj ĉefaj kvalitoj, elementoj au agoj, uzoj, k. t. p. ; kaj tiu ĉi estas la sufikso *aĵ*, kiu havas la ĝeneralan sencon de afero, objekto (ne, kiel oni tro ofte diras, *materia*, sed *konkreta*) kaj servas do por elfari *konkretajn* substantivojn. Ekz. : *blankaĵo, altaĵo, bonaĵo, diaĵo, amikaĵo, laktaĵo, porkaĵo, lanaĵo, feraĵo, trinkaĵo, manĝaĵo, vidaĵo*, k. t. p.

3° Sufikso por nomi specialan klason de aferoj, objektoj, aĵoj, t. e. ĉiujn aĵojn, kiuj estas difinitaj por helpi al ia faro, ĉiujn instrumentojn, ĉu naturajn, ĉu artajn. Tio estas la sufikso *il*, kiu kuniĝas ekskluzive kun verbaj radikoj, kiel ekz. *flugilo, naĝilo, komunikilo, propagandilo*, k. t. p. Ĝi estas do malpli ĝenerala kaj pli preciza ol ĝi, kvankam en kelkaj okazoj ne estas tre facile scii, kiun el ili oni devas prefere uzi : Ekz. : *Via lasta parolado estis tre bona propagandaĵo kaj povos esti por ni tre efika propagandilo.*

4° Sufikso por nomi specialan klason de aĵoj, kiuj entenas en si aŭ portas sur si pli malpli grandan amason da aliaj aĵoj de difinita speco ; kaj tio ĉi estas la sufikso *uj*, kiu kuniĝas precipe kun substantivaj radikoj, kaj servas praktike por elfari nomojn ĉu de mebloj, kestoj, vazoj, k. t. p. kiel ekz. *telerujo, ĉifonujo, abelujo, supujo, piprujo*, ĉu de arboj, kiel *pomujo, ĉeriĵujo*, ĉu de landoj (sed *nur* kiam oni nomas landon per la nomo de la gento ak nacio ĝin loĝanta), kiel ekz. *Franĉujo, Germanujo, Anglujo*, k. t. p. Oni trovas ĝin pli malofte kombinita kun verba radikoj, kiel ekz. *manĝujo, trinkujo, knedujo*, k. t. p.

5° Sufikso por nomi specialan klason de *ujoj*, kiuj entenas aŭ portas nur unu aĵon de difinita speco, kies ekstremaĵo restas libera. Ĝi estas la sufikso *ing*, kiu kombiniĝas preskaŭ ekskluzive kun substantivaj radikoj, kiel ekz. *cigaringo, kandelingo, piedingo, fingringo*, k. t. p. (tamen oni trovas ankaŭ *pendingo*.)

6° Sufikso por nomi ĉiun kolekton de aferoj aŭ estaĵoj samspecaj konsiderataj kiel kunestantaj. Ĝi estas la sufikso *ar*, kiu kombiniĝas ekskluzive kun substantivaj radikoj. kiel ekz. *arbaro, domaro, vagonaro, foliario, bovaro, gazetaro*, k. t. p.

7° Sufikso por nomi elementon, parton konsistigan de objekto. Ĝi estas la sufikso *er*, kontraŭparto de la sufikso *ar*, kiu same kiel ĝi kombiniĝas ekskluzive kun substantivaj radikoj, kiel ekz. *akvero, fajrero, pluvero, neĝero*, k. t. p.

8° Sufikso por nomi ĉiun lokon difinitan ĉu por ia ago, ĉu por ia speco de aferoj, bestoj aŭ personoj. Ĝi estas la sufikso *ej*, kiu kombiniĝas kun verbaj aŭ substantivaj radikoj, pli malofte kaj, ŝajnas, malpli ĝuste, kun adjektivaj, kiel ekz. *lernejo, preĝejo, kuirejo, ĉevalejo, bovejo, hundejo, konsulejo, ambasadorejo, secretariejo, densejo*, k. t. p.

Kelkaj ne tre bone distingis tiun ĉi sufikson de la sufikso *uj* ; kaj efektive ili havas inter si kelke da analogeco, precipe se oni konsideras la lastan en la nomoj de landoj, *Anglujo, Franĉujo*, k. t. p. ; sed la ĉefa diferenco estas, ke *ujo* estas efektiva, materia, kvazaŭ fizika objekto, samspeca kiel meblo, kesto, sako, arbo, k. t. p., dum *ejo* estas nur loko, spaco, sekve io idea kaj kvazaŭ geometria. Ekz. *abelujo* estas la kesto-dometo, en kiu loĝas la abeloj ; *abelejo* estas

la loko en la ĝardens, kie kunlokiĝaj la abelujoj aŭ kunvenas kaj libere vivas inter si la abeloj. Abelujon oni povas tuŝi, porti, renversi, k. t. p., tute ne abelejon.

Restas nun por ekzameni la sufiksojn uzatajn por elfari nomojn de personoj.

La plej generala el ĉiuj, kiu respondas al la sufikso *aj* inter la aferaj nomsufiksoj, estas la sufikso *ul*, kiu signifas persono, vivanta individuo, same kiel *aj*, signifas objekto, nevivanta afero. Ĝi aliĝas kun radikoj verbaj, substantivaj, kaj adjektivaj sed prefere kun tiuj du lastaj; ekz. *banulo*, *dormulo*, *garantiulo*, *ĝibulo*, *religiulo*, *ftizulo*, *blindulo*, *riĉulo*, k. t. p. Efektive la participaj finiĝoj *ant*, *int*, *ont*, *at*, *it*, *ot*, plej ofte konkurencas kun ĝi por la kombiniĝo kun verbaj radikoj: oni trovas pli ofte *dormanto*, *leganto*, ol *dormulo*, *legulo*, k. t. p.

Sed inter la « uloj » estas kategorioj, kiuj ebligas pli precizan montron de la nomataj personoj. Unu el ili estas la profesio, la kutima okupiĝo, kaj al ĝi respondas la sufikso *ist*, kiu kombiniĝas kun radikoj jen verbaj, jen substantivaj: kiel ekzemple *kuiristo*, *forĝisto*, *plugisto*, *panisto*, *viandisto*, *dentisto*, k. t. p. Dua estas la societo al kiu la nomita persono apartenas, la doktrino kiun ĝi sekvas; kaj al tiu kategorio respondas la sufikso *an*, kiu kombiniĝas nur kun radikoj substantivaj, ĉu de aferoj (societo, lando, doktrino), ĉu de personoj (religiestro, skolestro, k. t. p.), kiel ekz. *familiano*, *grupano*, *urbano*, *aĵiano*, *afrikano*, *samreligiano*, *samideano*, *kristano*, *mahometano*, k. t. p.

Ni povas tamen rimarkigi, ke pro troa obeemo al la kapricaj kutimoj de la naciaj lingvoj, tiun lastan sufikson tre ofte kaj tute erare anstataŭas la antaŭa. Oni ne diras *kongresisto* anstataŭ *kongresano*, sed oni ne ~~mal~~timas diri *esperantisto*, kiam la ĝusta vorto estus sendube *esperantano*; *budhisto*, *kalvinisto*, anstataŭ *budhano*, *kalvinano*, simile al *kristano*, *luterano*, k. t. p.

Apud tiuj sufiĉe ĝeneralaj afiksoj havas lokon pli specialaj, kiel *estr*, *ĉef*, *in*, *id*, *edz*, *bo*, *ge*, *ĉj*, *nj*, k. t. p., kiuj aligas nur al substantivoj por elfari nomojn de personoj, individuoj, konsiderataj laŭ iliaj sociaj aŭ familiaj interrilatoj: ekz. *regnestro*, *imperiestro*, *ĉefministro*, *ĉefepiskopo*, *patrino*, *regido*, *reginedzo*, *bofilo*, *gefratoj*, *paĉjo Joĉjo*, *panjo*, *Manjo*, k. t. p.

Nun la demando estas, ĉu estas necese aldoni novajn substantivajn sufiksojn al la ĉi supra listo. Ekzamenante la internaciajn vortojn de substantiva speco prunteprenitajn de Esperanto el la ĉefaj kulturaj lingvoj, ni konstatas, ke multaj el ili prezentas konstantajn finiĝojn tute similajn al sufiksoj; kaj tiuj kvazaŭsufiksoj estas, *acio*, *ismo*, kaj *oro* (tiu ĉi lasta ankaŭ sub la formo *atoro*). Ni citu kiel ekzemplojn: *abnegacio*, *administracio*, *arbitracio*, *civilizacio*, *deklaracio*, *delegacio*, *disertacio*, k. t. p.; *absolutismo*, *alkoholismo*, *anakronismo*, *anarkiismo*, *antagonismo*, *asketismo*, *ateismo*, *katolicismo*, k. t. p.; *administratoro*, *aktoro*, *ambasadoro*, *iniciatoro*, *profesoro*, *direktoro*, k. t. p.

Ĉu, anstataŭ multigi senfine tiaspecajn nomojn, ne estus pli bone ilin devenigi regule de pli simplaj radikoj, akceptante la finiĝojn *acio*, *ismo*, kaj *oro* (aŭ *atoro*) kiel efektivajn sufiksojn? Des pli ke tiuj simplaj radikoj jam troviĝas plej ofte en la Esperanta vortaro. Ekzemple, flanke de *administracio*, *absolutismo*, *administratoro*, *civilizacio*, *alkoholismo*, *deklaracio*, *delegacio*, *anarkiismo*, *asketismo*, *iniciatoro*, *direktoro*, ni havas ankaŭ la pli simplajn vortojn: *absoluta*, *administri*, *civilizi*, *alkoholo*, *deklari*, *delegi*, *anarkio*, *asketo*, *iniciati*, *direkti*, k. t. p.

Bedaŭrinde tiu paraleleco ne ĉiam ekzistas: ekzemple ni ne havas la simplajn radikojn *abneg*,

*disert, anakron, antagon, ate, ambasad, profes*, k. t. p. por respondi al *abnegacio, disertacio, anakronismo, antagonismo, ateismo, ambasadoro, profesoro*, k. t. p.

Plie la senco de tiuj kvazaŭsufiksoj ne povas esti difinita laŭ unuforma kaj konstanta maniero. Ekzemple *acio* havas tre ofte la saman sencon kiel la verba sufikso *ad*: *navigacio* plene egalvaloras *ŝipveturado*; *abnegacio* povus tradukiĝi per *sinforĝesado*, k. t. p.; sed en aliaj okazoj ĝi havas la sencon jen de *antaro*, jen de *ejo*. *Administracio*, kiam ĝi ne signifas *administrado*, signifas aŭ *administrantaro* aŭ *administrejo*: ŝajnas do tre malfacile uzi tiun finiĝon kiel efektivan sufikson. Sed estus sendube pli bone, se oni anstataŭigus ĝin, kiel eble plej ofte, per la veraj Esperantaj sufiksoj: se oni dirus: *administro, administrado, administrantaro, administrejo; deklaro, deklorado, deklaraĵo; civilizo, civilizado, civilizeco, civiliziteco, civilizitaro*, k. t. p. anstataŭ *administracio, deklaracio, civilizacio*; eĉ se oni ĉiam elektus kiel radikojn la pli simplajn formojn, kiel ekzemple *abneg, disert*, k. t. p. anstataŭ *abnegacio, disertacio* k. t. p.

Same *ism* havas en la naciaj lingvoj tre diversajn sencojn. Ŝajnas, unuavide, ke en ili ĝi respondas tre ofte al la sufikso *ist*: france *bouddhisme, bouddhiste; calvinisme, calviniste*, k. t. p.; ĉar en tiuj lingvoj *ist* ne signifas nur, kiel en Esperanto, profesian, kutiman okupiĝon, sed ankaŭ pli ofte komunan kredon, doktrinon. Kvankam nur erare oni uzis en Esperanto la sufikson *ist* por signifi « partiano de ia politika, religia aŭ filozofia doktrino » kaj la ĝusta sufikso en tiu okazo estas *an*, tamen la sufikso *ism* povus esti proponata por signifi « doktrinon, sistemon sekvatan de ia anaro. » Ekz. *platonismo*, doktrino de Platono aŭ de la Platonanoj; *aristotelismo*, doktrino de Aristotelo aŭ de la Aristotelanoj; *mahometismo*, doktrino de Mahometo aŭ de la Mahometanoj; *budhismo*, doktrino de Budho aŭ de la Budhanoj, (ne Budhistoj) k. t. p. Bedaŭrinde *ism* signifas ankaŭ multajn aliajn aferojn krom doktrino. En *alkoholismo, artritismo*, k. t. p. ĝi signifas ian eon aŭ emon de homa temperamento. Ĉu *alkoholismo, artritismo*, ne egalvaloras *alkoholuleco, artrituleco*? En *magnetismo, organismo*, ĝi havas ankoraŭ malsimilajn sencojn: *magneto* estas ĉu magneta forto, ĉu magneta fenomenaro; kaj tre certe *organismo* ne estas io alia ol *organaro*. Pro tiaj kaŭzoj estas tre malfacile uzi *ism* kiel difinitan sufikson, kaj eĉ ŝajnas dezirinde, ke oni kiel eble plej evitu enkonduki sen neceso novajn radikojn kun *isma* finiĝo.

Pri *oro, atoro*, la ĉefa kontraŭparolo estas, ke ĝi senutile duobligas la jam ekzistantajn *anto, ulo, isto*; ĉar ĝi havas tute la saman sencon. Kio estas *administratoro, iniciatoro, redaktoro, direktoro*, k. t. p. se ne *administranto, iniciatanto* aŭ *iniciatulo, redaktisto* aŭ *redaktanto, direktanto* aŭ *direktisto*, k. t. p.? Sed tie ĉi ankaŭ oni povus esprimi la deziron, ke la verkistoj kaj vortaristoj ne enkonduku sen efektiva bezono novajn nomojn kun « atora » finiĝo kaj preferu aligi al simplaj radikoj la klasikajn esperantajn finiĝojn.

Oni povas tamen diri, por senkulpigi kiel eble la enŝovigon de tiuj « aciaj », « ismaj » kaj « atoraj » formoj en la Esperanta vortaro, unue ke ili estas internaciaj, due ke ili apartenas preskaŭ senescepte, ne al la komuna lingvo, sed al la speciala idiomo de la scienculoj, kleruloj, k. t. p., kaj ke la internacieco povas sen granda malutilo superi la simplecon kaj regulecon, kiam la demando estas ne pri la komuna lingvo sed pri tiu speciala idiomo, des pli ke lingvo

internacia tute ne devas celi teoriantan perfektecon, sed sufiĉas ke ĝi estu praktike plej oportuna por ĉiuj kategorioj de homoj ĝin uzantaj.

#### IV

Nur kelkaj vortoj pri la propraj nomoj.

La nomojn de personoj ni allasis nur escepte; sed oni trovos sufiĉe grandan nombron da nomoj de popoloj kaj landoj, kvankam laŭ tiu rilato nia Vortaro prezentas certe multajn mankojn.

Ni ne provis solvi la malfacilan demandon pri la plej bona maniero formi tiajn nomojn; tamen ni starigis kiel principon, ke la ĉefa kaj plej ĝenerala maniero estas nomi primitive la landon kaj devenigi la nomon de ĝiaj loĝantoj per la sufikso *an*, kiel ekz. *Eŭropo*, *Eŭropano*; *Irlando*, *Irlandano*; *Pariĝo*, *Pariĝano*, k. t. p., kaj ke la alia maniero, t. e. nomante primitive la genton aŭ nacion kaj devenigante la nomon de la lando per la sufikso *uj*, kiel ekz. *Franco*, *Francujo*, *Germano*, *Germanujo*, estas dua, akcesora, sekve en okazo de dubo neniam preferinda. Nur kiam ekzistas efektive gentoj, nacioj, kavantaj propran historion, nur tiam oni povas diri, ke la popolo nomas sian landon, kaj uzi la duan procedon; sed en ĉiuj ceteraj okazoj estas pli ĝuste diri, ke la terloko nomas siajn loĝantojn; kaj pro tio ŝajnas al ni, ke ekster Eŭropo kaj kelkaj partoj de Azio kaj Afriko, ĉie aliloke, nome en Ameriko, oni devas formi la nomojn per la unua procedo. *Brazilo*, *Ĉilo*, *Peruo*, *Meksiko*, *Kanado*, k. t. p. ne estas, laŭ nia opinio, loĝantoj de *Brazilujo*, *Ĉilujo*, *Peruujo*, *Meksikujo*, *Kanadujo*, sed kontraŭe landoj, kies loĝantoj estas *Brazilanoj*, *Ĉilanoj*, *Peruanoj*, *Meksikanoj*, *Kanadanoj*, k. t. p. Ni do tre deziras, ke ĉiuj Esperantistoj konsentu pri tiu ĉi regulo: « En okazo de dubo oni ĉiam preferu la sufikson *an* al la sufikso *uj* por formi la nomojn de popoloj kaj de landoj. »

#### V

Konkludante ni esprimas la esperon, ke tiu ĉi verko, malgraŭ siaj multaj mabonaĵoj, povos utili al la disvatiĝo kaj normala evoluado de Esperanto, se nur ĝiaj legontoj bonvolos kunhelpi per siaj rimarkoj kaj kritikoj al ĝia konstanta plibonigado.

En Dijono, la 31an de Julio 1909.

E. B.

Faint, illegible text, likely bleed-through from the reverse side of the page.

? V  
C  
† V  
★  
A.  
Al  
A  
A  
A  
A  
A  
A  
A  
A  
Bo  
Df  
  
E  
E  
E  
E  
F  
F  
F  
F  
F  
F  
Fo  
Fo  
G.

## KLARIGA TABELO

### DE LA SIGNOJ KAJ MALLONGIGOJ

---

‡ Vorto, kies signifo estas duba aŭ utileco diskutebla.	Gd. <i>Granda vortaro franca-esperanta.</i>
† Vorto, kiu ŝajnas nerekomendinda.	Geogr. (geografio).
★ Vorto enkondukita de la aŭtoro.	Geol. (geologio).
A. Angla lingvo.	Geom. (geometrio).
Alg. (algebro).	Gr. Greka lingvo.
Anat. (anatomio).	Gra, GRABOWSKI.
Antr., antrop. (antropologio).	Gram. (gramatiko).
Arkeo. (arkeologio).	H. Hispana lingvo.
Arkit. (arkitekturo).	Hist. (historio).
Art. (artoj plastikaj).	H. n. (natura historio).
Astr. (astronomio).	I. Itala lingvo.
A. V., Av. Anatomia vortaro.	Ikt., ikti. (iktiologio).
Bot. (botaniko).	Jur. (juro).
Dfr, Df., <i>Vortaro franca-esperanta de la Presa Societo.</i>	Ka. KABE.
Ekl. (eklezio).	Kem. (kemio).
Elek. (elektro).	Kir. (kirurgio).
Ent., entom. (entomologio).	Kom. (komerco).
Etik. (etiko).	Kr., K. Krestomatio.
F. Franca lingvo.	L. Latina lingvo.
Farm. (farmacio).	L. v. laŭ vorto.
Fil. (filozofio).	M. T. Marista Terminaro.
Fin. (financo).	Mat. (matematiko).
Fiz. (fiziko).	Med. (medicino).
Fiziol. (fiziologio).	Mek. (mekaniko).
Fort. (fortikajarto).	Met. (metalurgio).
Fot. (fotografado).	Metr., met. (metriko).
G. Germana lingvo.	Mez. (mezurarto).
	Miner., min. (mineralogio).
	Mitol., mit. (mitologio).

Muz. (muziko).  
Nat. sc. (naturscienco).  
Num. (numismatiko).  
Ok. (okultismo).  
Opt. (optiko).  
Ornit. (ornitologio).  
Pale. (paleontologio).  
Psik. (psikologio).  
R. Rusa lingvo.  
Rab. *Rabistoj*.  
Ret. (retoriko).

Rev. *Reviĝoro*.  
Rh. RHODES, *Vortaro angla-esperanta*.  
Sc. (sciencoj).  
Tekn. (teknologio).  
Teol. (teologio).  
V. VERAX, *Teknika vortaro*.  
Voj. (vojagoj).  
W. D. *Vortaro germana-esperanta*.  
Z. ZAMENHOF.  
Zool. (zoologio).



## A

unua litero de la alfabeto, vokalo.  
Grafit'o	(min.) natura karbono. AFGHIR.	<i>graphite.</i>
Grafolog'o	grafologiisto. AFGHIR.	<i>graphologue.</i>
Grafologi'o	skribodiveno, arto diveni karakteron per skribado. AFGHIR.	<i>graphologie.</i>
Grafometr'o	(geom.) angulmezurilo.	<i>graphomètre.</i>
Grajl'o (V.)	vitro pulvorigita, vitropulvoro.	<i>grésil.</i>
GRAJN'O	semero, precipe ĉe la greno kaj cerealoj ; — <b>eto</b> , <b>eco</b> , <b>ecigi</b> , <b>igajo</b> . AFGHI.	<i>grain.</i>
Grajp'o (MT.)	(mar.) kurbigita lignaĵo kunigante kilon al antaŭkilo de ŝipo.	<i>brion, ringot.</i>
GRAK'I	korvekrii, korvebleki.	<i>croasser.</i>
GRAM'O	unuco de pezmezuro en la metra sistemo. AFGHIR.	<i>gramme.</i>
GRAMATIK'O	arto paroli kaj skribi korekte ; — <b>isto</b> . AFGHIR.	<i>grammaire.</i>
Gramen'o	komuna herbo kiel hordeo, aveno, holko, greno, k. t. p. ; — <b>acoj</b> .	<i>gramen.</i>
Grano (Df.)	(mek.) levilo. A.	<i>chèvre,</i>
GRANAT'O	(bot.) frukto de l'granatujo ( <i>punica granatum</i> ). AFGHIR.	<i>grenade.</i>
GRAND'A	multampleksa, vasta ; — <b>ajo</b> , <b>are</b> , <b>eco</b> , <b>ega</b> , <b>igi</b> , <b>iĝi</b> ; <b>pogrande</b> , <b>pligrandigi</b> ; <b>grand'aĝa</b> , <b>nombra</b> ; <b>trograndigi</b> . AFHI.	<i>grand.</i>
GRANDIOZ'A	impona pro grandeco, nobleco k. t. p. ; — <b>ajo</b> , <b>eco</b> , <b>ulo</b> . AFGHIR.	<i>grandiose.</i>
GRANIER'O	subtegmento, subtegmenta ĉambro. AFHI.	<i>grenier.</i>
GRANIT'O	tre malmola ŝtono. AFGHIR.	<i>granit.</i>
Granol'o	grajnetforma farmaciaĵo.	<i>granule.</i>
Grapl'o (MT.)	(mar.) ankreto kvardenta. AFI.	<i>grappin.</i>

<b>GRAS'O</b>	ŝmiraja substanco kiu troviĝas en la korpo de homoj kaj bestoj; — <b>ajo, igi, iĝi, ulo; malgrasa.</b> AFHI.	<i>graisse.</i>
<b>GRATI</b>	skrapi per ungoj; — <b>ado, ajo, de, for'grati.</b> FI.	<i>gratter (trans).</i>
<b>Graten'o</b> (Dfr.)	speco de kuirarango.	<i>gratin.</i>
<b>Grâtifikaĉi'o?</b> (Vr.)	donaco, rekompenco, premio; kromsalajro.	<i>gratification.</i>
<b>Gratiol'o</b> (V.)	(bot.) speco de skrofulariaco ( <i>gratiola</i> ).	<i>gratiolle.</i>
<b>GRATUL'I</b>	komplimenti pri feliĉa okazintaĵo; — <b>ado.</b> AF GHIR.	<i>fêliciter.</i>
<b>Graŭvak'o</b> (V.)	(min.) speco de grejso.	<i>grauwacke.</i>
<b>GRAVA</b>	atentinda, konsiderinda; — <b>ajo, eco, igi, iĝi, ulo; malgrava, sengravajo.</b> AFHI.	<i>grave, important.</i>
<b>GRAVED'A</b>	pli malpli baldaŭ naskonta idon; — <b>eco, igi, iĝi, ulino.</b>	<i>grosse, enceinte.</i>
<b>Gravit'i</b>	(fiz.) pezi, moviĝi pro pezo; — <b>ado.</b> AFHI.	<i>graviter.</i>
<b>GRAVUR'I</b>	ĉizi figuraĵojn sur metalo aŭ ligno por ilin reprodukti; — <b>ado, ajo, ejo, ilo, isto, arto.</b> AFGHIR.	<i>graver.</i>
<b>Greff'i</b>	inokuli, transporti branĉon sur alian arbon, k. t. p.; — <b>ado, ajo, ilo, isto.</b> AF.	<i>greffer.</i>
<b>Gregor'a</b> (Dfr.)	(kanto, almanako), laŭ papo Gregoro.	<i>grégorien.</i>
<b>Grejso</b> (V.)	(min.) sabloŝtono.	<i>grès.</i>
<b>GREN'O</b>	speco de nutra kreskaĵo, gramenaco ( <i>triticum</i> ); — <b>ero, aro, ejo, isto; gren'kampo, fasko, kesto; grenventumilo.</b>	<i>blé.</i>
<b>GRENAD'O</b>	(milit.) eksploda kugleto; — <b>isto.</b> AFGHIR.	<i>grenade.</i>
<b>Grenat'o</b> (V.)	(min.) speco de helruĝa juvelŝtono.	<i>grenat.</i>
<b>GRI'O</b>	delikata faruno; — <b>ajo.</b> AF.	<i>gruau.</i>
<b>GRIF'O</b>	fabla rabobirdo; — <b>grifvulturo</b> ( <i>vultur gryphus</i> ). AFGHI.	<i>griffon.</i>
<b>Grifeo</b> (V.)	(zool.) speco de ostroj ( <i>gryphea</i> ).	<i>gryphée.</i>
<b>Grifel'o</b>	gravurilo; — <b>bekforma grifelo</b> ( <i>bédane</i> ).	<i>burin.</i>
<b>GRIL'O</b>	(entom.) speco de insekto ortoptero ( <i>gryllus</i> ). FGHI.	<i>grillon.</i>
<b>GRIMAC'O</b>	nerva tordiĝo de vizaĝaj trajtoj; — <b>ado, ema, ulo; lipgrimaci.</b> AFGR.	<i>grimace.</i>
<b>GRIMP'I</b>	suprenrampi; — <b>ado, anto, igi, isto, uloj; grimpobirdoj.</b> F.	<i>grimper.</i>
<b>GRINC'I</b>	aŭdigi agacan bruon (V. <b>knari</b> ); — <b>eco, igi; grinceigi la dentojn,</b> ( <i>agaci</i> ). AFI.	<i>grincer.</i>
<b>Grip'o</b>	(med.) komunikigema malsano; — <b>ulo.</b> FGHI.	<i>grippe.</i>
<b>GVID'I</b>	montri la vojon al, konduki; — <b>ado, anto, ilo, isto.</b>	<i>guider.</i>



<b>GRIZA</b>	samkolora kiel cindro, fero; — <b>ajo, eta, igi</b> ; <b>grizflava</b> ( <i>beige</i> ); <b>grizbarbulo</b> . AFHI.	<i>gris.</i>
<b>Grog'o</b>	varma trinkaĵo el brando, sukero, citrono kaj akvo. AFGR.	<i>grog.</i>
<b>Gros'o</b>	(bot.) speco de riboj ( <i>ribes</i> ); — <b>ecoj, aloj</b> .	<i>groseille.</i> 7
<b>Groŝ'o</b>	germana monero; (V.) dekdu dekduoj da?	<i>gros; grosse?</i>
<b>GROT'O</b>	kavaĵo, antro, kaverno. AFGHIR.	<i>grotte.</i>
<b>GROTESK'A</b>	ridinda; — <b>ajo, ulo</b> . FGHIR.	<i>grotesque.</i>
<b>GRU'O</b>	(ornit.) speco de stilzbirdoj ( <i>grus</i> ). FHI.	<i>grue.</i>
<b>GRUM'O</b>	lakeeto. AFGR.	<i>groom.</i>
<b>Grumbl'i</b>	plendmurmuri; — <b>ema</b> .	<i>grincher, ronchonner.</i>
<b>GRUND'O</b>	terfundo. AG.	<i>sol.</i>
<b>Grund'i</b> (M.T.)	(mar.) (pri ŝipo) tusi la marfundon kaj surhalti; — <b>igi</b> .	<i>s'échouer.</i>
<b>Grundsel'o</b> (Rh.)	(bot.) speco de kreskaĵo, senecio? alsino? por la kaĝobirdoj. A.	<i>seneçon, mouron?</i>
<b>Grunt'i</b>	porkebleki. AFGHI.	<i>grogner.</i>
<b>GRUP'O.</b>	anaro; — <b>ano, ejo, igi, igi</b> . AFGHIR.	<i>groupe.</i>
<b>Gruz'o</b>	dika sablo, ŝtonetaro.	<i>grenailles, gravier.</i>
<b>Guan'o</b>	marbirda sterkajo el Peruo.	<i>guano.</i>
<b>Guberni'o</b>	administracia landparto.	<i>gouvernement (division de pays).</i>
<b>Gubernator'o</b>	guberniestro.	<i>gouverneur.</i>
<b>GUDR'O</b>	karbopeĉo; — <b>ado, eca, umi, ita</b> .	<i>goudron.</i>
<b>Guf'o</b>	(ornit.) speco de strigo ( <i>bubo</i> ).	<i>grand-duc.</i>
<b>Gul'o</b> (V.)	(zool.) speco de viandomanĝa mamulo ( <i>gulo</i> ).	<i>glouton.</i>
<b>Gulden'o</b>	V. <b>floreno</b> .	<i>florin.</i>
<b>Gum'o</b>	speco de mucilaga rezino; — <b>eco, ita; araba, traganta gumo; gumatubo</b> . AFGHIR.	<i>gomme.</i>
<b>Gumigut'o</b>	speco de flava gumo FGIR.	<i>gomme-gutte.</i>
<b>Guŝo</b>	(muz.) portebla orgeno.	<i>orgue de barbarie.</i>
<b>Gurnard'o</b> (V.)	(ekti) speco de marfiŝo ( <i>trigla gurnardus</i> ).	<i>grondin.</i>
<b>Gused'o</b>	speco de ŝiptrabaĵo. AF.	<i>gousset.</i>
<b>GUST'O</b>	sento ricevita per buŝo kaj palato; — <b>ado, eco, eto, umo, igi; sengusta; posta gusto, langusta, brulgusta</b> .	<i>goût.</i>
<b>GUT'I</b>	flueti per akveroj; — <b>eti, ado; de, dis' guti; gut'brui, ampoltubo</b> .	<i>goutter.</i>
<b>Gutaperk'o</b>	speco de kaŭĉuko (senelasta).	<i>gutta-perca.</i>
<b>GUVERN'I</b>	zorgi pri infanoj; — <b>ist'o-ino</b> .	<i>gouverner (des enfants).</i>
<b>Guz'o</b>	iliria muzikilo.	<i>guzla.</i>
<b>Gval'a</b>	(geog.) ano de Gvalujo, brita lando (Kimrujo).	<i>Gallois.</i>
<b>GWARDI'O</b>	(milit.) garda roto; — <b>antaŭ, post, flank' gvardio</b> .	<i>garde.</i>

Ĝ

<p><b>Ĝ</b> <b>Ĝangal'o</b> <b>ĜARDEN'O</b></p>	<p>naŭa litero de la esperanta alfabeto. hinda marĉaĵo. kulturita loko por floroj, legomoj kaj fruktarboj k. t. p.; — <b>isto</b>; <b>frukt</b>, <b>flor</b>, <b>legomĝardeno</b>; <b>ĝarden'</b> laborado, kulturo. AFGHIR.</p>	<p><i>Dj.</i> <i>jungle.</i> <i>jardin.</i></p>
<p><b>ĜEM'I</b> <b>ĜEMEL'O</b> (Vr.) <b>ĜEN'I</b></p>	<p>plorplendi; — <b>ado</b>, <b>eco</b>, <b>inda</b>; <b>ekĝemi</b>. FHI. dunaskito. malhelpi, tedi, embarasi; — <b>ado</b>, <b>ajo</b>, <b>eco</b>, <b>ulo</b>; <b>sengena</b>. FG.</p>	<p><i>gémir.</i> <i>jumeau.</i> <i>général, déranger.</i></p>
<p><b>ĜENDARM'O</b> <b>ĜENERAL'A</b></p>	<p>poliĉmilitisto; — <b>aro</b>, <b>estro</b>, <b>ejo</b>. rilata al tuta speco, senescepta; — <b>ajo</b>, <b>eco</b>, <b>igi</b>, <b>ebla</b>. AFHI.</p>	<p><i>gendarme.</i> <i>général</i> (adj.).</p>
<p><b>Ĝeni'o</b> (Rh.) <b>Ĝet'o</b> (MT.) <b>ĜENTIL'A</b></p>	<p>V. <b>genio</b>? (mar.) havendigo. AFI. bonmaniera, afablemiena; — <b>ajo</b>, <b>eco</b>, <b>ulo</b>; <b>malĝentila</b>. AFHI.</p>	<p><i>génie.</i> <i>jetée.</i> <i>poli, courtois.</i></p>
<p><b>ĜERM'O</b></p>	<p>parto de semo kiu naskas novan vivaĵon; — <b>ado</b>, <b>igi</b>; <b>sengerma</b>. AFHIR.</p>	<p><i>germe.</i></p>
<p><b>ĜI</b></p>	<p>pronomo de la tria persono por montri estajon senseksan aŭ kies sekso estas ne atentinda; — <b>ĝia</b>.</p>	<p><i>il, cela.</i></p>
<p><b>ĜIB'O</b></p>	<p>dorsa aŭ brusta elstaraĵo; — <b>eto</b>, <b>ulo</b>, <b>hava</b>, <b>igi</b>. FH.</p>	<p><i>bosse.</i></p>
<p><b>Ĝi'o</b> <b>Ĝimkan'o?</b> (Rh.) <b>Ĝin'o</b> <b>Ĝinece'o?</b> <b>Ĝir'i</b></p>	<p>angla mezurerero, duonpajnto. sportkunveno. speco de brita grenbrando. AFGHIR. V. <b>gineceo</b>. garanti bilon per aldona subskribo; — <b>ado</b>, <b>anto</b>; <b>ĝiro'</b> kontobanko.</p>	<p><i>demi-pinte.</i> <i>réunion sportive.</i> <i>gin.</i> <i>gynécée.</i> <i>endosser.</i></p>
<p><b>ĜIRAF'O</b></p>	<p>speco de mamulo (<i>camelopardalis girafe</i>); — <b>viro</b>, <b>ino</b>, <b>ido</b>, <b>ejo</b>. AFGHIR.</p>	<p><i>girafe.</i></p>
<p><b>ĜIS</b></p>	<p>atinganté (lokon ou tempon); — <b>ĝis'</b> <b>nune</b>, <b>t'ama</b>, <b>kie?</b> <b>tie</b>, <b>hodiaŭ</b>.</p>	<p><i>jusqu'à</i> (ce que).</p>
<p><b>ĜOJI</b></p>	<p>senti plezuron en la animo, esti gaja; — <b>ado</b>, <b>eco</b>, <b>ego</b>, <b>igi</b>; <b>malĝoja</b>. AFHI.</p>	<p><i>se réjouir.</i></p>
<p><b>ĜUI</b></p>	<p>trovi plezuron en io; — <b>ado</b>, <b>anto</b>, <b>ego</b>, <b>igi</b>, <b>ama</b> AF.</p>	<p><i>jouir.</i></p>
<p><b>ĜUST'A</b></p>	<p>preciza, ekzakta, akurata; — <b>eco</b>, <b>igi</b>, <b>ilo</b>; <b>malĝusta</b>, <b>alĝustigi</b>, <b>ĝustatempe</b>. AFHI.</p>	<p><i>juste, exact.</i></p>

H

<b>H</b>	deka litero de la esperanta alfabeto.	<i>H.</i>
<b>HA</b>	ekkrio de surprizo, ĝojo k. t. p.	<i>ah! ha!</i>
<b>Haban'a</b> (Df.)	(cigaro) de sudamerika lando. V. <b>havan'a</b> .	<i>havane.</i>
<b>Haĉ'i</b> (V.)	ombrostreki; — <b>ado, aĵo</b> . AF.	<i>hachurer.</i>
<b>Hades'o</b>	(mit.) greka nomo de la infero.	<i>Hadès.</i>
<b>Hadji'o</b>	(voj.) meka pilgriminto.	<i>hadji.</i>
<b>Hagiograf'o</b> (Df.)	(sc.) hagiografiisto.	<i>hagiographe.</i>
<b>Hagiografi'o</b> (Df.)	historio de la sanktuloj.	<i>hagiographie.</i>
<b>Hajduk'o</b>	hungara piedsoldato.	<i>heiduque.</i>
<b>HAJL'O</b>	glaciigita pluvo; — <b>ero</b> ; <b>hajl' neĝo, pluvo</b> .	<i>grêle.</i>
<b>HAK'I</b>	distranĉi per hakilo; — <b>eti, egi, ado, aĵo, ilo, isto; de, dis, ek, el, ĉirkaŭ, tra' haki; elhaki sian vojon</b> . FGHI.	<i>hacher.</i>
<b>HAL'O</b>	ĉambrego; vendejo. AFGH.	<i>hall, halle.</i>
<b>Hal'o</b> (Rh.)	(fot. meteor.) V. <b>haloo</b> .	<i>halo.</i>
<b>Halo'o</b> (V.)	(meteor. fot.) 1) lumkrono, 2) lummakulo; <b>antihaloo</b> .	<i>halo.</i>
<b>HALADZ'O</b>	putra enblovo; — <b>igi</b> .	<i>exhalaison mauvaise.</i>
<b>HALEBARD'O</b>	speco de antikva pikarmilo; — <b>isto</b> . AFGHIR.	<i>hallebarde.</i>
<b>HALELUJA'O?</b> (Rh.)	ĝoja ekkrio en hebreaĵ kaj kristanaj kantoj (Ĉu ne preferinde <b>halelujo</b> ?)	<i>alleluia.</i>
<b>Halogen'o</b> (V.)	(kem.) korpo naskanta salon per kombiniĝo kun metaloj: kloro, bromo, jodo, fluoro.	<i>halogène.</i>
<b>Halojd'a</b> (V.)	(kem.) (sal.) el halogeno kaj metalo.	<i>haloïde.</i>
<b>Hals'o</b> (V.)	(mar.) ŝnuro fiksanta la angulon de malsupera velo; <b>halsodirekti</b> .	<i>amure.</i>
<b>Halt'i</b>	ĉesi movon, antaŭeniradon, senmoviĝi; — <b>eti, ado, ejo, ig'i-ilo, ebla; senhalte; haltpunkto</b> ( <i>point d'arrêt</i> ); <b>haltigŝuo</b> ( <i>sabot de frein</i> ). AFGI.	<i>s'arrêter.</i>
<b>Halter'o</b>	gimnastika pezaĵo. FHI.	<i>haltère.</i>
<b>Halucin'i</b>	senterarigi; — <b>ulo</b> . AFHIR.	<i>halluciner.</i>
<b>Halucinaci'o?</b>	halucinaĵo.	<i>hallucination.</i>
<b>HALUK'O?</b> (Rh.)	dika piedfingro, piedpolesko.	<i>pouce du pied.</i>
<b>Hamadrias'o</b>	(zool.) speco de simio ( <i>hamadryas</i> ).	<i>hamadryas.</i>
<b>HAMAK'O</b>	pendlito, retlito. AFHR.	<i>hamac.</i>
<b>Hamstr'o</b>	(zool.) speco de rato ( <i>mus cricetus</i> ).	<i>hamster.</i>

<b>Hanap'o ?</b> (V.)	speco de pokalego.	<i>hanap.</i>
<b>Handikap'o</b>	konkura egaligo ; — <b>ajo, anto, isto.</b>	<i>handicap.</i>
<b>Hans'o</b> (Rh.)	federacio de komercaj urboj ; <b>hansa ligo.</b> AFGHIR.	<i>hanse.</i>
<b>HAR'O</b>	haŭta surkreskaĵo fadenforma ; — <b>eto, ego, ajo, aro ; kol, okul, vang, lip'haroj ; har' ligo, pinglo, tufo ; senhara.</b> AG.	<i>poil, cheveu.</i>
<b>Haradri'o ?</b>	(ornit.) V. <b>karadrio.</b>	<i>pluvier.</i>
<b>HARD'I</b>	malmoligi, fortigi personon aŭ beston ; — <b>eti, igi ; soldato milit'mont'hardita.</b> AG.	<i>endurcir.</i>
<b>Harem'o</b>	virina ĉambraro, virinejo, edzinarejo ĉe mahometanoj. V. <b>gineceo.</b> AFGHIR.	<i>harem.</i>
<b>HARING'O</b>	speco de marfiŝo ( <i>clupea harengus</i> ). AFGHI.	<i>hareng.</i>
<b>Harmona</b>	(mat.fiz.) 1) (harmona) proporcio, 2) (harmonaj) sonoj.	<i>harmonique.</i>
<b>HARMONI'O</b>	aranĝo de partoj bone interkonsentantaj ; — <b>igi, isto.</b> AFGHIR.	<i>harmonie.</i>
<b>Harmonik'o</b> (V.)	(fiz.) harmonsono ; — <b>ilo ?</b> harmoniko. (muz.) AFGHIR.	<i>harmonique.</i>
<b>Harmonik'o</b> (Rh.)	(muz.) speco de muzikilo.	<i>harmonica.</i>
<b>Harmonium'o</b>	orgeneto. AFGHIR.	<i>harmonium.</i>
<b>HARP'O</b>	muzika kordinstrumento ; — <b>ist' -ino.</b> AFGHIR.	<i>harpe.</i>
<b>Harpi'o</b>	(mit. ornit.) fabla monstro ; speco de rabobirdo ( <i>thrasaëtus harpyia</i> ).	<i>harpie.</i>
<b>HARPUN'O</b>	sagpikilo por kapti balenon, k. t. p. AFGHR.	<i>harpon.</i>
<b>Hart'i</b>	(tek.) trempi por malmoligi (ŝtalon) ; — <b>malharti.</b>	<i>tremper l'acier.</i>
<b>Haruspeks'o</b>	(hist.) romana divenisto, aŭguristo.	<i>aruspice.</i>
<b>HAŬT'O</b>	membrano kiu tegas la homan korpon ; — <b>eca, igi ; senhaŭta ; haŭt'malsano, veziko.</b> G.	<i>peau.</i>
<b>Haŭtiz'o</b>	(milit.) bombardilo.	<i>obusier.</i>
<b>HAV'I</b>	posedi, teni ; — <b>ajo, ebla, inda, ujo, ulo, igi, igi ; en, mal, ne, re'havi ; senenhava.</b> AFGHI.	<i>avoir.</i>
<b>Havan'a ?</b> (Rh.)	V. <b>habana.</b>	<i>havanais.</i>
<b>HAVEN'O</b>	ŝipŝirmejo ; <b>antaŭ, ekster, post, flos' haveno ; haven'barilo, digo, pago.</b> AFG	<i>port, hâvre.</i>
<b>HAZARD'O</b>	okazo, sorto, neantaŭviditaĵo ; <b>hazarda ludo.</b> AFGHR.	<i>hasard.</i>
<b>HE</b>	ekkrio, alvoko.	<i>hé! eh!</i>
<b>HEBRE'O</b> (K.)	antikva nomo de la Judoj ; — <b>ejo ; hebrea kvartalo, leĝlibro.</b>	<i>juif.</i>

<b>Hebreismo</b>	aparta esprimo de la hebrea lingvo.	<i>hébraïsme.</i>
<b>HEDER'O</b>	speco de kreskaĵo dukotiledona ( <i>hedera helix</i> ). HI.	<i>lierre.</i>
<b>Hedisar'o</b> (V.)	(bot.) speco de fabacoj ( <i>hedysarum</i> ).	<i>sainfoin.</i>
<b>HEĜIR'O</b>	datepoko de la mahometanoj.	<i>hégire.</i>
<b>Hejduk'o?</b> (V.)	V. <b>hajduko</b> .	<i>heiduque.</i>
<b>HEJM'O</b>	familia domo; — <b>ama, ema, hava, sidulo; senhejma.</b> AG.	<i>le foyer domestique.</i>
<b>HEJT'I</b>	varmigi (lokon); — <b>ado, isto, ilo.</b> AG.	<i>chauffer.</i>
<b>Hekatomb'o</b> (K.)	buĉofero da cent brutoj. AFGHIR.	<i>hécatombe.</i>
<b>Heksaedr'o</b>	sesedro, sesfaca solido.	<i>hexaèdre.</i>
<b>Heksametr'o</b>	sespieda verso. AFGHIR.	<i>hexamètre.</i>
<b>Hektar'o</b> (K.)	franca kampmezurero, centaro. AFGHIR.	<i>hectare.</i>
<b>Hektik'a</b>	(febroy) malrapida, kiu kaŭzas iom post iom konsumigon de malsanulo.	<i>hectique.</i>
<b>Hektograf'o</b>	skriba multobligilo.	<i>hctographe.</i>
<b>Hektogram'o</b>	pezo da cent gramoj. AFGHIR.	<i>hctogramme.</i>
<b>Hektolitr'o</b>	mezurilo kiu enhavas cent litrojn. AFGHIR.	<i>hctolitre.</i>
<b>Hektometr'o</b>	longeco egala je cent metroj.	<i>hctomètre.</i>
<b>HEL'A</b>	klara, brila, lumplena; — <b>ajo, eco, igi, igi; malhela, heligi</b> (fot.) (maldensigi kliŝon). G.	<i>clair, lumineux.</i>
<b>Helamis'o</b>	(zool.) speco de ratoj ( <i>helamys</i> ).	<i>helamys.</i>
<b>HELEBOR'O</b>	(bot.) speco de ranunkolacoj ( <i>helleborus</i> ) V. <b>eleboro.</b> AFHI.	<i>ellébore.</i>
<b>Helen'a</b>	pragreka.	<i>hellénique.</i>
<b>HELENISM'O</b>	greka kulturo.	<i>hellénisme.</i>
<b>Heliant'o</b>	(bot.) speco de kompozito ( <i>helianthus</i> ).	<i>hélianthe.</i>
<b>Heliantem'o</b> (V.)	(bot.) speco de cistoj ( <i>helianthemum</i> ).	<i>hélianthème.</i>
<b>Helic'o</b>	(mat.) kurbolinio ŝtraŭbforma; helica ŝipaparato.	<i>hélice.</i>
<b>Helicoid'a</b>	helicforma.	<i>hélicoïde.</i>
<b>HELIK'O</b>	(zool.) speco de molusko gastropodo ( <i>helix</i> ); — <b>ajo.</b> L.	<i>escargot.</i>
<b>Helikopter'o</b> (V.)	speco de flugludilo.	<i>hélicoptère.</i>
<b>Helikriz'o</b> (V.)	(bot.) speco de kompozitoj ( <i>helichrysum</i> ).	<i>immortelle.</i>
<b>Holiks'o</b>	(anat.) rando de la ekstera orelo.	<i>hélix.</i>
<b>Heliogravur'o</b>	fotografata gravuro, sungravuro.	<i>héliogravure.</i>
<b>Heliometr'o</b>	aparato por mezuri la ŝajnan diametron de l'suno, k. t. p.	<i>héliomètre.</i>
<b>Helioskop'o</b>	(ast.) sunrigardilo.	<i>hélioscope.</i>
<b>Heliostat'o</b> (V.)	(ast.) aparato kiu sekvas aŭtomate la movon de l'suno.	<i>héliostat.</i>

<b>HELIOTROPO</b> 'O	(bot.) speco de boragacoj ( <i>heliotropium</i> ). AFGH IR.	<i>héliotrope.</i>
<b>Helium</b> 'o	(kem.) metalo freŝdate trovita.	<i>hélium.</i>
<b>Helm</b> 'o	speco de kasko.	<i>heaume.</i>
<b>HELP</b> 'I	faciligi, favori la agadon de, alporti protekton al; — <b>ado, ajo, ema, ilo, isto, ulo, ant'o-ino</b> ; <b>malhelpi, helpa trupo</b> ( <i>renfort</i> ).	<i>aider.</i>
<b>Helvel</b> 'o	speco de fungo ( <i>helvella</i> ); — <b>acoj</b> .	<i>helvelle.</i>
<b>Hemant</b> 'o (V.)	(bot.) speco de amarilisacoj ( <i>hæmanthus</i> ).	<i>hémnanthe.</i>
<b>Hematit</b> 'o (V.)	(min.) natura feroksido sangokolora.	<i>hématite.</i>
<b>Hematop</b> 'o (V.)	(ornit.) speco de stilzbirdo ( <i>hæmatopus ostralegus</i> ).	<i>huitrier.</i>
<b>HEMIKRANT</b> 'O	(med.) kapdoloro.	<i>migraine.</i>
<b>Hemion</b> 'o (V.)	(zool.) speco de sovaĝa azia azeno ( <i>asinus hemionus</i> ).	<i>hémione.</i>
<b>Hemiplegi</b> 'o	(med.) paralizo de duonkorpo; — <b>ulo</b> .	<i>hémiplegie.</i>
<b>Hemiptero</b>	klaso de insektoj, kiel cikadoj, afisoj, cimoj, k. t. p.	<i>hémiptère.</i>
<b>HEMISFER</b> 'O	duonsfero.	<i>hémisphère.</i>
<b>Hemoglobin</b> 'o	(anat.) koloriga substanco de la sango.	<i>hémoglobine.</i>
<b>Hemoliz</b> 'o (V.)	(med.) l. v. sangosolvo, sanganalizo; — <b>ema</b> .	<i>hémolyse.</i>
<b>Hemoni</b> 'o (V.)	(entom.) speco de kolepteroj ( <i>haemonia</i> ).	<i>hémonie.</i>
<b>Hemoragi</b> 'o	(med.) sangelfluo.	<i>hémorragie.</i>
<b>Hemorojd</b> 'o	(med.) tumoro de la anusvejnoj kun sangelfluo. AFGHIR.	<i>hémorroïde.</i>
<b>HEPAT</b> 'O	(med.) granda glando kiu sekrecias galon. AF HI.	<i>foie.</i>
<b>Hepatik</b> 'o ★	speco de kreskaĵoj senkotiledonaj ( <i>hepatica</i> ).	<i>hépatique.</i>
<b>Herakle</b> 'o (V.)	(bot.) speco de umbelifero ( <i>heracleum</i> ).	<i>berce.</i>
<b>Heraldik</b> 'o	scienco pri blazono. AFGHIR.	<i>science héraldique.</i>
<b>HERB</b> 'O	kreskaĵo mola kaj verda; — <b>ajo, aro, ejo, ero, eto</b> ; <b>herbo'bedo, kovro, riĉa, porta</b> . AF HI.	<i>herbe.</i>
<b>HERBARI</b> 'O	herbokolekto.	<i>herbier.</i>
<b>HERED</b> 'I	ricevi ion de mortinto; — <b>ajo, eco, anto, ulo, igi</b> ; <b>senheredigi</b> . AFHI.	<i>hériter. (trans.).</i>
<b>HEREZ</b> 'O	doktrino kontraŭa al la eklezia doktrino; — <b>eca, ulo, isto</b> . AFGHIR.	<i>hérésie.</i>
<b>Herkule</b> 'a	apartenanta aŭ similanta al Herkuleso (Z. <i>La Rabistoj</i> ).	<i>herculéen.</i>
<b>Hermafrodit</b> 'a	ambaŭseksa; — <b>eco</b> . AFGHIR.	<i>hermaphrodite.</i>
<b>Hermes</b> 'a	V. <b>hermetika</b> .	<i>hermétique.</i>
<b>Hermetik</b> 'a	rilata al la alkemio; — <b>eco, igi</b> ( <i>luti hermetike</i> ). AFGHIR.	<i>hermétique.</i>

<b>HERNI'O</b>	tumoro naskita pro eliro de organo ekster sia loko tra membrano; — <b>ulo</b> ; <b>entordita hernio</b> . AFGHI.	<i>hernie.</i>
<b>HERO'O</b>	duondio, grandfarulo; — <b>ino</b> , <b>ajo</b> , <b>eco</b> . AFGHIR.	<i>héros.</i>
<b>HEROLD'O</b>	milita anoncisto. AFGHIR.	<i>hérault.</i>
<b>Herpest'o</b> (V.)	(zool.) alia nomo de ikneŭmono ( <i>herpestes</i> ).	<i>mangouste.</i>
<b>Hetairo</b> (Df)	(greka) malĉastulino, publikulino.	<i>hétaïre.</i>
<b>Heterogen'a</b>	malsamnatura, malhomogena; — <b>eco</b> AFGHIR.	<i>hétérogène.</i>
<b>Hetman'o</b>	kozakestro ( <i>Z. la Rabistoj</i> ).	<i>hetmann.</i>
<b>HEZITI</b> (Vr.)	ŝanceliĝi (spirite), malcertiĝi, senkonsiliĝi. AFGI.	<i>hésiter.</i>
<b>Hiacint'o</b>	speco de liliacoj ( <i>scilla</i> ) AFGHIR.	<i>hyacinthe.</i>
<b>Hibisk'o</b>	(bot.) speco de malvacoj ( <i>hibiscus</i> ); — <b>oidoj</b> .	<i>ketmie.</i>
<b>Hibrid'a</b>	(h. n.) naskita de ĝepatroj el du malsamaj rasoj (mestizo); — <b>ulo</b> . AFHI.	<i>hybride.</i>
<b>Hidatid'o</b>	(med.) intesta vermo.	<i>hydatide.</i>
<b>HIDR'O</b>	(mit. zool.) fabla serpento; speco de polipoj ( <i>hydra</i> ). AFGHIR.	<i>hydre.</i>
<b>Hidral'oj?</b> (V.)	(bot.) klaso de kreskaĵoj ( <i>ceratophyllum?</i> )	<i>hydrales.</i>
<b>Hidramin'o</b> (V.)	(kem. fot.) kemiaĵo uzata en fotografado.	<i>hydramine.</i>
<b>HIDRARG'O</b>	(kem.) metalo fluida, densega; vivargento; — <b>ajo</b> .	<i>mercure.</i>
<b>Hidrat'o</b> (V.)	(kem.) komponaĵo el akvo kun bazo.	<i>hydrate.</i>
<b>Hidraŭlik'a</b>	(mek.) rilata al akvomovoj.	<i>hydraulique.</i>
<b>Hidrid'o</b> (V.)	(kem.) kombinaĵo de simpla korpo kun hidrogeno.	<i>hydrure.</i>
<b>Hidrocefal'o</b>	(med.) akvokapulo.	<i>hydrocéphale.</i>
<b>Hidrocel'o</b> (V.)	(med.) akvotumoro.	<i>hydrocèle.</i>
<b>Hidrodinami-</b> <b>k'o</b>	(mek.) scienco pri akvoforto.	<i>hydrodynamique.</i>
<b>Hidrofil'a</b>	akvosorbema.	<i>hydrophile.</i>
<b>Hidrofobi'o</b>	(med.) rabio, akvotimo; — <b>ulo</b> . AFHIR.	<i>hydrophobie.</i>
<b>Hidrogen'o</b>	(kem.) simpla korpo kiu naskas akvon per kombino kun oksigeno.	<i>hydrogène.</i>
<b>Hidrograf'o</b>	(sc.) hidrografiisto.	<i>hydrographe.</i>
<b>Hidrografi'o</b>	(sc.) scienco pri maroj, riveroj, k. t. p.; — <b>isto</b> .	<i>hydrographie.</i>
<b>Hidroĉanta -</b> <b>r'oj?</b> (V.)	(entom.) akvokoleopteroj.	<i>hydrocanthares.</i>
<b>Hidrokarbid'o</b> (V.)	(kem.) karbido de hidrogeno.	<i>hydrocarbure.</i>
<b>Hidrokarbo -</b> <b>n'o</b>	(kem.) komponaĵo de karbono kaj hidrogeno.	<i>hydrocarbone.</i>
<b>Hidrokinon'o</b>	kemiaĵo uzata en fotografado.	<i>hydroquinone.</i>
<b>Hidrokorak'o</b> (V.)	(ornit.) speco de palmipedo, akvokorvo, markorvo ( <i>hydrocorax</i> ).	<i>cormoran.</i>

<b>Hidrokoris'o</b> (V.)	(entom.) speco de hemipteroj, akvocimo.	<i>hydrocorise.</i>
<b>Hidrokti'lo</b> (V.)	(bot.) speco de umbeliferoj (akvotelero) ( <i>hydrocotyle</i> ).	<i>hydrocotyle.</i>
<b>Hidroksid'o</b>	(kem.) komponaĵo el akvo kaj metaloksido.	<i>hydroxyde.</i>
<b>Hidroksilami- no</b> (V.)	(kem. fot.) organika bazo el hidroksilo kaj alia korpo.	<i>hydroxylamine.</i>
<b>Hidroksil'o</b>	oksidamoniako.	<i>hydroxyle.</i>
<b>Hidrometr'o</b>	instrumento por mezuri pezecon, densecon, k. t. p. de la fluidaĵoj.	<i>hydromètre.</i>
<b>Hidrometri'o</b>	scienco por mezuri pezecon, densecon, k. t. p. AFGHIR.	<i>hydrométrie.</i>
<b>Hidropati'o</b>	(med.) akvokuracado. AFGHIR.	<i>hydropathie.</i>
<b>Hidrops'o</b>	(med.) akvoŝvelo, malsano. AFGI.	<i>hydropsie.</i>
<b>Hidroskop'o</b>	fonteltrovisto. AFGHIR.	<i>hydroscope, sourcier.</i>
<b>Hidrostatik'o</b>	(sc.) parto de la mekaniko pri ekvilibro de fluidaĵoj. AFGHIR.	<i>hydrostatique.</i>
<b>HIDROTERA- PI'O</b>	akvokuracado; — <b>ajo, isto.</b> AFGHIR.	<i>hydrothérapie.</i>
<b>HIEN'O</b>	(zool.) speco de rabomamulo ( <i>hyæna</i> ); — <b>oido.</b> AFGHIR.	<i>hyène.</i>
<b>Hieraci'o</b> (V.)	(zool.) speco de kompozijto ( <i>hieracium</i> ).	<i>épervière des murs.</i>
<b>HIERARĤI'O</b>	V. <b>hierarkio.</b>	<i>hiérarchie.</i>
<b>HIERARKI'O</b>	ordo de rangoj de gradoj; — <b>estro.</b> AFGHIR.	<i>hiérarchie.</i>
<b>Hieratik'a</b>	rilata al sanktaĵoj, pastraĵoj.	<i>hiératique.</i>
<b>HIERAŬ</b>	la ĵus antaŭan tagon; — <b>a, e</b> ; <b>antaŭhieraŭ.</b> F.	<i>hier.</i>
<b>Hierofalk'o</b>	(ornit.) V. <b>girofalko.</b>	<i>gerfaut.</i>
<b>Hieroglif'o</b>	praegipta skribosigno; — <b>aro.</b> AFGHIR.	<i>hiéroglyphe.</i>
<b>HIGIEN'O</b>	arto konservi sanon; — <b>isto.</b> AFGHIR.	<i>hygiène.</i>
<b>Higrometr'o</b>	mezurilo de la malsekeco de la aero. AFGHIR.	<i>hygromètre.</i>
<b>Higrometri'o</b>	(fiz.) arto mezuri la malsekecon de la aero. AFGHIR.	<i>hygrométrie.</i>
<b>Higroskop'o</b> (V.)	(fiz.) instrumento por konstati la malsekecon de la aero.	<i>hygroscope.</i>
<b>Hil'o</b>	(bot.) parto de la grajno per kiu ĝi teniĝas al la ovujo ( <i>hilum</i> ).	<i>hile.</i>
<b>Hil'o</b> (V.)	(zool.) speco de rano ( <i>hyla</i> ).	<i>rainette.</i>
<b>Himantop'o</b> (V.)	(ornit.) speco de stilzbirdo ( <i>himantopus</i> ).	<i>échasse.</i>
<b>Himen'o</b>	(anat.) virgulina membrano. AF.	<i>hymen.</i>
<b>Himeni'o</b> (V.)	(bot.) membrano spordona, sporujo.	<i>hymenium.</i>
<b>Himenopter'o</b>	(entom.) klaso de insektoj kiel abelo, formiko, k. t. p.	<i>hyménoptère.</i>
<b>HIMNO</b>	religia kanto; — <b>aro</b> ; <b>edziĝhimno.</b> AFGHIR.	<i>hymne.</i>



<b>HIND'O</b>	sudazia popolano; — <b>ujo</b> .	<i>Hindou.</i>
<b>Hiperbol'o</b>	(mat. ret.) 1) speco de kurblinio, asimptoto; 2) retorika figuraĵo. AFGHIR.	<i>hyperbole.</i>
<b>Hiperboloid'o</b>	(mat.) solido ricevita per la revoluo de hiperbolo.	<i>hyperboloïde.</i>
<b>Hiperemi'o</b>	(med.) alfluego de sango, l. v. supersangeco.	<i>hypéremie.</i>
<b>Hiperfokus'a</b>	(fot.) (distanco) de la plej proksima klarvidebleco en aparato enfokusigita rilate al horizonto, superfokusa.	<i>hyperfocal.</i>
<b>Hiperhejt'i</b> (V.)	superhejti.	<i>surchauffer.</i>
<b>Hiperik'o</b> (V.)	(bot.) speco de dukotiledonoj dialipetaloj ( <i>hypericum</i> ); — <b>acoj, oidoj</b> .	<i>millepertuis.</i>
<b>Hipometro - p'a</b>	(opt. med.) (okulo) en kiu la optika akso estas pli longa ol en normala okulo.	<i>hypermétrope.</i>
<b>Hipertrof'a</b> (V.)	(med.) superkreska, trokreska (organo); — <b>eco, igi</b> . AFGHIR.	<i>hypertrophique.</i>
<b>HIPNOT'O</b>	nenatura dormo; — <b>anto, eco, isto, igi, iĝi</b> . AFGHIR.	<i>hypnose.</i>
<b>Hipnotism'o</b>	doktrino pri hipnoto.	<i>hypnotisme.</i>
<b>Hipocikloid'o</b>	(mat.) speco de kurblinio.	<i>hypocycloïde.</i>
<b>Hipoderm'a</b> ★	(med.) subhaŭta.	<i>hypodermique.</i>
<b>Hipodrom'o</b>	ĉevalkurejo. AFGHIR.	<i>hippodrome.</i>
<b>Hipogastr'o</b>	(anat.) substomako. AFGHIR.	<i>hypogastre.</i>
<b>Hipogloso</b> (V.)	(anat. zool.) 1) sublanga nervo. 2) speco de pleŭronekto ( <i>pleuronectes hypoglossus</i> ).	<i>hypoglosse; flétan.</i>
<b>Hipocondr'o</b> (K.)	(anat.) ĉiu el la du flankaj partoj de abdomeno sub epigastro.	<i>hypocondre.</i>
<b>Hipokondri'o</b>	(med.) melankolio; — <b>eco, ema, ulo</b> . AFGHIR.	<i>hypocondrie.</i>
<b>Hipokamp'o</b> (Df.)	(ikti) ĉevalraŭpo, speco de fiŝeto ( <i>hippocampus</i> ).	<i>hippocampe.</i>
<b>HIPOKRIT'I</b>	ŝajnigi, afekti honestecon, amikecon k. t. p.; — <b>ado, ajo, eco, ema, ulo</b> . AFGHIR.	<i>faire l'hypocrite.</i>
<b>Hipopotam'o</b>	(zool.) speco de dikhaŭta mamulo, riverĉevalo, nilĉevalo ( <i>hippopotamus</i> ). AFHI.	<i>hippopotame.</i>
<b>HIPOTEK'O</b>	rajto donita al kreditoro rilate al bieno de ŝuldanto; — <b>akto; ŝhipoteko</b> .	<i>hypothèque.</i>
<b>Hipotenuz'o</b>	plej granda latero de ortangula triangulo. AFGHIR.	<i>hypoténuse.</i>
<b>HIPOTEZ'O</b>	supozo farita por ion klarigi. AFHIR.	<i>hypothèse.</i>
<b>Hipuris'o</b> (V.)	(bot.) speco de akvokreskaĵoj dukotiledonaj ( <i>hippuris</i> ).	<i>hippuris.</i>
<b>Hipurit'o</b> (V.)	(geol.) fosilia duklapa molusko.	<i>hippurite.</i>
<b>HIRT'A</b>	(hararo) malglata; — <b>eco, igi, iĝi</b> . L.	<i>ébouriffé.</i>
<b>HIRUND'O</b>	(ornit.) speco de migrabirdo ( <i>hirundo</i> ); — <b>ino, ido; hirundvosto</b> ( <i>queue d'aronde</i> ) v. FHI.	<i>hirondelle.</i>

<b>HIRUD'O</b>	(zool.) vermo sangosuĉa ( <i>hirudo sanguisuga</i> ); — <b>oidoj</b> . L.	<i>sangsue.</i>
<b>HISKIAM'O</b>	(bot.) speco de solanaco, l. v. porkofabo ( <i>hyoscyamus</i> ). FL.	<i>jusquiame.</i>
<b>HISOP'O</b>	(bot.) speco de lamiaco ( <i>hysopus</i> ). AFGHIR.	<i>hysope.</i>
<b>HISPAN'O</b>	sudokcidenta eŭropa popolano; — <b>ujo</b> .	<i>Espagnol.</i>
<b>Hist'o</b>	(med.) viva teksaĵo; <b>kuniga histo</b> .	<i>tissu.</i>
<b>HISTERI'O</b>	(med.) nerva malsano; — <b>ulo</b> . AFGHIR.	<i>hystérie.</i>
<b>Histologi'o</b>	(fiz.) esplorado de la organikaj histoj; — <b>isto</b> . AFGHIR.	<i>histologie.</i>
<b>HISTORI'O</b>	scienco pri la pasintaj okazaĵoj de la homaro; — <b>isto</b> ; <b>prahistorio</b> , <b>antaŭhistorio</b> . AFH IR.	<i>histoire.</i>
<b>HISTRIK'O</b>	(zool.) speco de mamulo ( <i>histris</i> ). L.	<i>porc épic.</i>
<b>Histrion'o</b>	antikva arlekeno. AFGHI.	<i>histrion.</i>
<b>HO</b>	ekkrio de surprizo, indigno, k. t. p.	<i>ho! oh!</i>
<b>Hobal'o?</b> (V.)	(bot.) alia nomo por mirho ( <i>balsamodendron myrrha</i> ).	<i>myrrhe.</i>
<b>HOBOJO</b>	(muz.) muzika blovinstrumento; — <b>isto</b> . AFG HIR.	<i>hautbois.</i>
<b>HODIAŬ'O</b>	nuna tago; — <b>a, e</b> . L.	<i>aujourd'hui.</i>
<b>HOK'O</b>	kroĉilo; — <b>eto, ego</b> ; <b>pord, fis'hoko</b> ; <b>hok'</b> <b>angulo, stango, fadeno, najlo</b> . AG.	<i>croc, crochet.</i>
<b>Hokajm'o?</b> (Rh.)	speco de vino, rejna vino. A.	<i>vin du Rhin.</i>
<b>HOLAND'O</b>	nordokcidenta eŭropa lando; — <b>ano</b> .	<i>Hollande.</i>
<b>Hold'o</b>	(mar.) ŝipkelo. A.	<i>cale.</i>
<b>Holk'o</b> (V.)	(bot.) speco de gramenaco ( <i>holcus</i> ).	<i>houque.</i>
<b>Holomorfa</b> (V.)	(mat.) l. v. plenforma, tutforma.	<i>holomorphe.</i>
<b>Holoturi'o</b> ★	speco de ekinodermoj, marbestoj ( <i>holothuria</i> ).	<i>holoturie.</i>
<b>HOM'O</b>	la plej alta el ĉiuj animalaj specoj pro inteli- genco ( <i>homo sapiens</i> ); — <b>eto, ido, ar'o</b> — <b>ano</b> ; <b>hom'amulo, evitulo</b> ; <b>hom'mangulo,</b> <b>mortiganto</b> ; <b>hom'linio, portilo,</b> <b>sumo</b> ; <b>hom'forma</b> ; <b>fiŝ, kavern'homo</b> ; <b>sen, super homa</b> ; <b>senhomigi</b> ; <b>kvazaŭ-</b> <b>homo</b> . AFHI.	<i>homme.</i>
<b>HOMAĜI'O?</b> (Gr.)	oferdono; fideljuro; respekta submetiĝo. AF HI.	<i>hommage.</i>
<b>Homar'an'ismo</b> (Z.)	doktrino de amo al la homaro.	<i>homaranisme.</i>
<b>Homeopati'o</b>	(med.) kuracado de malsano per simila malsano; — <b>ano</b> . AFGHIR.	<i>homéopathie.</i>
<b>HOMER'A</b>	rilata al la greka poeto Homero.	<i>homérique.</i>
<b>Homini'o</b>	(paleont.) prahomaro.	<i>humanité préhistorique.</i>

<b>Homogen'a</b>	samnatura, senmiksa; — <b>eco</b> . AFGHIR.	<i>homogène.</i>
<b>Homografi'o</b>	(mat.) speciala interrilato de du linioj.	<i>homographie.</i>
<b>Homolog'a</b>	(geom. anat.) interresponda (latero, organo). A AFGHIR.	<i>homologue.</i>
<b>Homologi'o</b>	(geom.) homologeco.	<i>homologie.</i>
<b>HOMONIM'O</b>	samnomulo. AFGHIR.	<i>homonyme.</i>
<b>Homoteti'o</b> (V.)	(geom.) speciala interrilato de du geometriaj figuroj.	<i>homothétie.</i>
<b>HONESTA</b>	virta, honorinda; — <b>ajo, eco; dubehonesta, malhonestajo</b> . AFHI.	<i>honnête.</i>
<b>HONOR'I</b>	montri respekton al iu; — <b>ebla, eco, inda; por la honoro de; senhonora; fondo je la honoro</b> . AFHI.	<i>honorer.</i>
<b>HONORARI'O</b>	salajro, pago de advokatoj, profesoroj, kuracistoj, k. t. p. AFGHIR.	<i>honoraires.</i>
<b>HONT'I</b>	senti humiligon, ruĝiĝi pro kulpo aŭ ofendo; — <b>ajo, eco, ema, inda, ulo, igi, iĝi; hontindaĵo, senhonta, hontigi iun</b> .	<i>avoir honte de.</i>
<b>Hopli'o</b> (V.)	(entom.) speco de koleoptero ( <i>hoplia</i> ).	<i>hoplie.</i>
<b>HOR'O</b>	dudekvara parto de tago; <b>laŭ'hore; duon'horo; ban'poŝ'horo; hor'montrilo, signilo; ĉiuhora</b> . AFHI.	<i>heure.</i>
<b>HORDE'O</b>	(bot.) speco de gramenaco, cerealo ( <i>hordeum</i> ). FL.	<i>orge.</i>
<b>HORIZONT'O</b>	cirkla linio kies observanto estas centro. AFGHIR.	<i>horizon.</i>
<b>HORIZONTALA</b>	paralela al horizonto.	<i>horizontal.</i>
<b>HORLOG'O</b>	maŝino por montri la horojn; — <b>ujo, isto; poŝ, vek, pendol, risort'horloĝo; horloĝa radaro</b> . FHI.	<i>horloge.</i>
<b>HOROSKOP'O</b>	astrologia antaŭdiro.	<i>horoscope.</i>
<b>Hortensi'o</b>	(bot.) speco de florkreskaĵo ( <i>hydrangeum hortensia</i> ). AFGHIR.	<i>hortensia.</i>
<b>HORTULAN'O</b>	(ornit.) speco de paserbirdo ( <i>emberiza hortulana</i> ).	<i>ortolan.</i>
<b>HOSPITAL'O</b>	malsanulejo; — <b>kampa, infekta, antaŭzorga</b> . AFGHIR.	<i>hôpital.</i>
<b>HOSTI'O</b>	(ekl.) eŭkaristia pano.	<i>hostie.</i>
<b>HOTEL'O</b>	gastejo; — <b>eto; hotelmastr'o-ino</b> . FGHI.	<i>hôtel.</i>
<b>Huant'o</b>	(mar.) ŝnurego liganta mastkapojn al flankoj de ŝipo. AFGR.	<i>hauban.</i>
<b>HUB'O</b>	hejmkampo, herbejo; — <b>ulo</b> .	<i>champ, pré, clos.</i>
<b>HUF'O</b>	ungego (ĉevala, bova k. t. p.); — <b>unu, du'hufulo; huffer'i-ajo, isto; hufofrapi</b> . AG.	<i>sabot des animaux.</i>

<b>Hukabak'o ?</b> (Rh.)	reliefa linajo.	<i>grosse toile ouvree.</i>
<b>Hul'o</b> (Rh.)	(mar.) ŝipkorpo. A.	<i>coque de navire.</i>
<b>HUMAN'A</b>	homsenta, kompatema, civiliza, kultura, klera; — <b>eco, isto ; senhumaneco.</b>	<i>humain.</i>
<b>Humanismo</b>	beletristika kulturo. AFGHIR.	<i>humanisme.</i>
<b>Hum'o</b>	kultura tero, ĝardentero. FGH..	<i>humus, terreau.</i>
<b>HUMER'O</b>	(anat.) ŝultrosto; — <b>humertordeco.</b> AFHI.	<i>humérus.</i>
<b>HUMIL'A</b>	malfiera; — <b>eco, ema, ulo, igi, iĝi ; malhumila ; memhumiligo.</b> AFHI.	<i>humble.</i>
<b>HUMOR'O</b>	temperamento, karaktero, sprito; — <b>ajo, ema, isto, ulo ; gaj, malbon'humoro.</b> AFGHIR.	<i>humeur.</i>
<b>HUND'O</b>	(zool.) hejma kvar piedulo ( <i>canis domesticus</i> ); — <b>viro, ino, ido, ejo, isto, aĉo, eto, aro ; kur, graj, mel, cerv, ĉas, halt, sang, perdrik, rapid, rat'hundo ; hundo'domo, ŝnuro, bleko, malsano, edukisto, tenilo, viando ; hundherbo.</b> AG.	<i>chien.</i>
<b>HUNGAR'O</b>	(geog.) centreŭropa popolano; — <b>ujo.</b>	<i>hongrois.</i>
<b>HURA</b>	ĝoĝa, aproba akلامo.	<i>hurrah.</i>
<b>Hurd'o</b> (V.)	branĉoplektaĵo, maŝoplekto, platkorbo.	<i>claié.</i>
<b>HUSAR'O</b>	(milit.) hungara kavaleriano ; speciala rajdsoldato. AG.	<i>hussard.</i>
<b>Huŝ'o</b> (V.)	(ekti.) speco de salmo ( <i>salmo hucho</i> ). AFGHIR.	<i>huch.</i>
<b>Huz'o</b>	(ekti.) speco de fiŝo ( <i>acipenser guso</i> ).	<i>grand esturgeon.</i>

## Ĥ

<b>Ĥ</b>	dekunua litero de la esperanta alfabeto.	<i>kh.</i>
<b>Ĥano</b> (Rh.)	(voj.) karavana logejo.	<i>khan.</i>
<b>ĤAOS'O</b>	(mit.) V. <b>kaoso.</b>	<i>chaos.</i>
<b>ĤEMI'O</b>	(sc.) V. <b>kemio.</b>	<i>chimie.</i>
<b>ĤIMERO</b>	V. <b>kimero.</b>	<i>chimère.</i>
<b>ĤIN'A</b>	(geog.) mezazia popolano; — <b>ujo.</b>	<i>chinois.</i>
<b>ĤIRURG'O</b>	V. <b>kirurgo.</b>	<i>chirurgien.</i>
<b>ĤIRURGI'O</b>	V. <b>kirurgio.</b>	<i>chirurgie.</i>
<b>ĤOLERO</b>	(med.) epidemia malsano (oni proponis anstataŭigi per <b>ĉolero</b> aŭ <b>morbuso</b> ). AFGHIR.	<i>choléra.</i>
<b>ĤORO</b>	kantantaro, kantistaro; — <b>ano, ejo, isto.</b> (oni proponis anstataŭigi per <b>ĉoro</b> aŭ <b>koruso</b> .) AFGHIR.	<i>chœur.</i>
<b>Ĥorografi'o</b>	V. <b>korografio.</b> AFGHIR.	<i>chorographie.</i>

<b>ĤORUS'O</b>	speco de muzika verkaĵo. AFGHIR.	<i>choral.</i>
<b>Ĥrom'a</b>	V. <b>kroma.</b>	<i>chromique.</i>
<b>Ĥromatrop'o</b>	V. <b>kromatrop'o.</b>	<i>chromatrophe.</i>
<b>Ĥromograf'o</b>	V. <b>kromografo.</b>	<i>chromographe.</i>
<b>Ĥromografi'o</b>	V. <b>kromografio.</b>	<i>chromographie.</i>
<b>Ĥromolito- graf'o</b>	V. <b>kromolitografo.</b>	<i>chromolithographie.</i>
<b>Ĥromosfer'o</b>	V. <b>kromosfero.</b>	<i>chromosphère.</i>
<b>Ĥronik'a</b>	V. <b>kronika.</b> AFGHIR.	<i>chronique.</i>
<b>Ĥronogram'o</b>	V. <b>kronogramo.</b>	<i>chronogramme.</i>
<b>Ĥronologi'o</b>	V. <b>kronologio.</b> AFGHIR.	<i>chronologie.</i>
<b>Ĥronometr'o</b>	V. <b>kronometro.</b> AFGHIR.	<i>chronomètre.</i>
<b>Ĥronoskop'o</b>	V. <b>kronoskopo.</b>	<i>chronoscope.</i>
<b>Ĥura</b>	V. <b>hura.</b>	<i>hourra !</i>

I

<b>I</b>	dekdua litero de la esperantista alfateto.	<i>I.</i>
<b>I</b>	finiĝo de la infinitiva modo ĉe la verboj, ekz : <i>dormi, kanti</i> , k. t. p. Kun adjektivaj radikoj ĝi havas signifon : esti tia, havi la econ de la adjektivo, ekz : <i>utili, avari</i> , k. t. p. Kun nomaj radikoj de objektoj ĝi signifas : agi per tiuj objektoj laŭ ilia naturo, ilin uzi, ekz : <i>kroni, veneni, tamburi</i> k. t. p. Kun nomaj radikoj de personoj ĝi signifas : havi la situacion aŭ fari la oficon de tiuj personoj, ekz : <i>reĝi, estri</i> k. t. p.	<i>marque de l'infinitif.</i>
<b>IA</b>	adjektivo montra kiu signifas unu el ; — <b>ia'maniere, foje, tempe, ajn.</b>	<i>quelque, certain.</i>
<b>Iak'o?</b> (V.)	(bot.) signifo ne trovita (zool.) speco de simio.	<i>ouistiti.</i>
<b>IAL</b>	pro ia kauzo ; — <b>ial ajn.</b>	<i>pour quelque raison.</i>
<b>IAM</b>	iatepe ; — <b>iam kaj iam.</b>	<i>un jour, une fois, jadis.</i>
<b>Ibis'o</b>	(ornit.) speco de stilzbirdo ( <i>ibis</i> ). AFGHIR.	<i>ibis.</i>
<b>ID'O</b>	naskito, infano, filo ; — <b>ino, aro ; duonido.</b>	<i>enfant de, descendant de, fils de.</i>
<b>Id'?</b> (V.)	uzata kiel teknika sufikso en kemio kaj natursciencoj kun signifo de deveno aŭ de parenceco.	<i>suffixe spécial en chimie et histoire naturelle.</i>
<b>IDE'O</b>	pensaĵo, spirita kreaĵo ; — <b>igi ; samideano.</b> AFGHIR.	<i>idée.</i>
<b>IDEAL'O</b>	celideo ; — <b>eco, ema, isto, igi.</b> AFGHIR.	<i>idéal.</i>
<b>IDEALISMO</b>	idealemo, idealeco. AFGHIR.	<i>idéalisme.</i>

<b>IDENT'A</b>	perfekte sama; — <b>ajo, eco, igi iĝi</b> . AFGHIR.	<i>identique.</i>
<b>Ideofonik'o</b> (K.)	arto reprezentante ideojn per voĉoj. AFGHIR.	<i>idéophonétique.</i>
<b>Ideograf'o</b>	ideografiisto. AFGHIR.	<i>idéographe.</i>
<b>Ideografi'o</b>	arto reprezentante ideojn per skribosignoj. AFGHIR.	<i>idéographie.</i>
<b>Ideografi'k'o</b> (K.)	V. <b>ideografio</b> .	<i>idéographie.</i>
<b>Ideolalik'o</b> (K.)	arto reprezentante ideojn per parolo. AFGHIR.	<i>idéolalie?</i>
<b>Ideolog'o</b> (V.)	ideologiisto. AFGHIR.	<i>idéologue.</i>
<b>Ideologio</b>	scienco de la ideoj; — <b>isto</b> . AFGHIR.	<i>idéologie.</i>
<b>Idili'o</b>	speco de kampara poemeto. AFGHIR.	<i>idylle.</i>
<b>IDIOM'O</b>	aparta lingvo de provinco, nacio. AFGHIR.	<i>idiome.</i>
<b>IDIOT'A</b>	malsprita, seninteligenta; — <b>ajo, eco, ulo</b> . AFGHIR.	<i>idiot.</i>
<b>Idiotism'o</b>	(gram.) nacia dirmaniero, idiomaĵo; — <b>uzi idiotismojn</b> . AFGHIR.	<i>idiotisme.</i>
<b>Idiosinkrazio</b>	aparta temperamento. AFGHIR.	<i>idiosyncrasie.</i>
<b>IDOL'O</b>	statuo, figuraĵo de falsa Dio; — <b>eco, aro, ejo, ano, isto; idol'servo, kulto</b> . AFGHIR.	<i>idole.</i>
<b>IE</b>	ialoke.	<i>quelque part.</i>
<b>IEL</b>	iamaniere; — <b>iel ajn</b> .	<i>de quelque façon.</i>
<b>IES</b>	de iu.	<i>de quelqu'un.</i>
<b>IG'I</b>	sufikso por devenigi verbojn ĉu el nomoj, ĉu el adjektivoj, ĉu el aliaj verboj, ekz: <b>filigi, ŝtonigi; blankigi, varmigi; farigi, vidigi</b> , k. t. p.; kun la signifo: fari; ekz: <b>ŝtonigi</b> , fari ion ŝtono; <b>varmigi</b> , fari ion varma k. t. p. Oni antaŭ uzas ĝin kiel aparta vorto; <b>al, an, ar, dis, eks, el, en, et, for, kun, sen, sur, star'igi</b> .	<i>faire rendre.</i>
<b>Ignam'o</b> (Rh.)	(bot.) speco de dioskoreo ( <i>dioscorea</i> ). V. <b>dioskoreo</b> . AFGHIR.	<i>igname.</i>
<b>IGNOR'I</b>	vole nescii; — <b>ulo</b> . AFGHIR.	<i>ignorer.</i>
<b>Igvan'o</b> (V.)	(zool.) speco de amerikaj rampuloj.	<i>iguane.</i>
<b>IĜI</b>	sufikso por devenigi verbojn ĉu el nomoj, ĉu el adjektivoj, ĉu el aliaj verboj, ekz: <b>filigi, ŝtonigi; blankigi, varmigi; farigi, vidigi</b> , k. t. p. kun signifo pasiva, responda al la sufiko <b>ig</b> . V. <b>ig</b> .	<i>se faire, devenir.</i>
<b>Iĥtiografi'o</b>	priskribo de fiŝoj; — <b>isto</b> . V. <b>iĥtiologio</b> .	<i>ichtyologie.</i>
<b>Iĥtiokol'o</b>	fiŝgluo. FI.	<i>ichtyocolle.</i>
<b>Iĥtiologio</b>	(sc.) scienco pri fiŝoj.	<i>ichtyologie.</i>
<b>Iĥtiozaŭr'o</b> (Rh.)	(geol.) V. <b>iktiosaŭro</b> .	<i>ichtyosaure.</i>

<b>Ikneumon'o</b> (Df.)	(zool. entom.) 1) faraonrato, v. <b>herpesto</b> ; 2) speco de himenopteroj ( <i>ichneumon</i> ).	<i>ichneumon.</i>
<b>Ikon'o</b>	sanktfiguro, bildo.	<i>icône.</i>
<b>Ikonogeno</b>	(kem. fot.) ĥemia rivelilo.	<i>iconogène.</i>
<b>Ikonometr'o</b> (V.)	(fot.) aparato por mezuri fokusan distancon.	<i>iconomètre.</i>
<b>Ikosaedro</b>	(geom.) dudekedro.	<i>icosaèdre.</i>
<b>Iksodo</b> (Rh.)	(entom.) speco de akaroido.	<i>ixode.</i>
<b>Iktero</b>	(med.) flavmalsano.	<i>ictère.</i>
<b>Iktiosaŭro</b> (V.)	(paleont.) speco de fosilia rampulo, fiŝlacerto.	<i>ichtyosaure.</i>
<b>IL</b>	sufikso kiu signifas instrumenton kaj devenigas nomojn el verboj, ekz.: <b>kombilo, tranĉilo, falĉilo</b> , k. t. p.; — <b>o, aro</b> ; <b>epoko de ŝtonaj iloj</b> .	<i>marque l'outil, l'instrument.</i>
<b>Ile'o</b> (Df.)	(anat.) plejdika parto de la maldika intesto.	<i>iléon.</i>
<b>ILI</b>	pronomo de la tria persono multnombra.	<i>ils, elles, eux.</i>
<b>Iliad'o</b>	poemo de Homero.	<i>Iliade.</i>
<b>Iliak'a</b>	koksa; <b>iliaka kavaĵo</b> .	<i>iliaque.</i>
<b>ILEKS'O</b>	speco de arbo ( <i>ilex aquifolium</i> ) V. <b>akvifoliacoj</b> ; — <b>ejo</b> . L.	<i>houx.</i>
<b>ILUMIN'I</b>	lumigi ekstere domojn monumentojn, k. t. p. AFGHIR.	<i>illuminer.</i>
<b>ILUMINACI'O?</b>	iluminado.	<i>illumination.</i>
<b>Ilium'o</b>	(anat.) kokso; <b>iliumosto</b> koksosto.	<i>ilium, ilion.</i>
<b>ILUSTR'I</b>	ornami tekstojn per desegnaĵoj; — <b>ado, aĵo, isto, ita</b> . AFGHIR.	<i>illustrer.</i>
<b>ILUZI'O</b>	falsa ŝajno, malfidinda kredo, espero; — <b>aĵo, isto, iĝi</b> ; <b>seniluzia</b> . AFGHIIR.	<i>illusion.</i>
<b>IMAG'I</b>	reprezenti al si spirite ion kvazaŭ oni vidus ĝin; — <b>ado, aĵo, ebla, ema, iĝi</b> ; <b>neimagebla</b> . AFHI.	<i>imaginer, s'imaginer.</i>
<b>Imaginar'o</b>	(mat.) speco de algebra kvanto kiu ne ekzistas sed povas reprezentiĝi per signoj kaj kalkuliĝi.	<i>imaginaire.</i>
<b>IMIT'I</b>	agi same kiel agas iu aŭ fari ion tutsimilan al io alia; — <b>ado, aĵo, ebla, ema, inda, ulo</b> ; <b>neimitebla</b> . AFGHIR.	<i>imiter.</i>
<b>Imperativo</b> (Df.)	(gram. fil.) 1) ordona modo de la verbo; 2) ordona formulo de morala devo. AFGHI.	<i>impératif.</i>
<b>Imperatoro</b>	(hist.) romana armeestro.	<i>imperator.</i>
<b>Imperfekt'o</b>	(gram.) tempo pasinta de la verbo en kelkaj lingvoj. AFGHI.	<i>imparfait.</i>
<b>IMPERI'O</b>	vasta, multpopola regno; — <b>eco, estr'o-ino, ano</b> ; <b>via imperia moŝto</b> ; <b>imperia konsiligo</b> . AFHIR.	<i>empire.</i>

<b>IMPERIAL'O</b>	supra parto de omnibuso.	<i>impériale.</i>
<b>Imperialism'o</b>	doktrino de la partianoj de imperio, imperianismo.	<i>impérialisme.</i>
<b>IMPERTINEN-T'A</b>	aroganta, malrespekta; — <b>ajo, eco, ulo.</b> AFGHI.	<i>impertinent.</i>
<b>IMPLICIT'A</b>	silente komprenata, ne esprimita.	<i>implicite.</i>
<b>IMPLIK'I</b>	enmeti, enbarasi, enplekti en; — <b>ado, igi, ita.</b> AFHIR.	<i>impliquer.</i>
<b>IMPON'I</b>	fari grandan efekton, impresi; — <b>ado, anto.</b> AFGHIR.	<i>imposant (être).</i>
<b>IMPORT'I</b>	komerce enporti; — <b>ado, ajo, anto; importimposto.</b>	<i>importer.</i>
<b>IMPOST'O</b>	depago; — <b>ejo; haven, milit, komere, ter, urb' imposto; limimpostejo; imposta-gento; impostevitisto.</b> AFGHI.	<i>impôt.</i>
<b>Impotent'a</b>	(fiziol.) nekapabla (naski); — <b>eco.</b> AFGHIR.	<i>impuissant.</i>
<b>Impozi'i (V.)</b>	(tekn) pretigi foliojn laŭ paĝordo por presado.	<i>imposer.</i>
<b>Impregn'i</b>	(fiziol.) fekundigi. AFGHI.	<i>imprégner.</i>
<b>IMPRES'I</b>	fari efekton sur, ekciti, kormovi; — <b>ajo, ebla, ema, ili, igi; impresentristo.</b> AFHI.	<i>impressionner.</i>
<b>IMPRESARI'O</b>	teatrestro, aktorestro. AFGHIR.	<i>impresario.</i>
<b>IMPROVIZ'I</b>	elparoli, fari ion senprepare; — <b>ado, ajo, anto, isto, ita; improvize akompani.</b> AFGHIR.	<i>improviser.</i>
<b>IMPULS'O</b>	antaŭenpuŝo, instigo; — <b>ema; ekimpulsigi.</b> AFGHIR.	<i>impulsion.</i>
<b>IMPUT'I</b>	alkalkuli; — <b>ebla, eco.</b> AFHI.	<i>imputer.</i>
<b>IMUN'A</b>	liberigita, kvitigita de, ŝirmita kontraŭ; — <b>eco, igi.</b> AFGHIR.	<i>qui possède l'immunité.</i>
<b>Imuniz'i (V.)</b>	(med.) imunigi. AFGHIR.	<i>immuniser.</i>
<b>IN</b>	sufikso por devenigi virinajn nomojn el viraj ekz: <b>patrino, filino, bovino, katino,</b> k. t. p.; — <b>o, a, e.</b>	<i>marque du féminin.</i>
<b>Inanici'o? (Rh.)</b>	(med.) malsatego.	<i>inanition.</i>
<b>INAŬGURI' (V.)</b>	solene malfermi, komenci, unuafoji (Df.). AFGHIR.	<i>inaugurer.</i>
<b>INAŬGURA-C'O?</b>	inaŭgurado. AFGHIR.	<i>inauguration.</i>
<b>INCENS'O</b>	bonodorfumo, bonodora rezino, olibano; — <b>ado, ilo, isto.</b> AFHI.	<i>encens.</i>
<b>Incid'o (V.)</b>	(fiz. opt.) enfalo sur, renkontiĝo kun; — <b>eco; incid'radio, angulo, ebena.</b>	<i>insidence.</i>
<b>INCIT'I</b>	vigliĝi, aktivigi, koleretigi; — <b>ado, ajo, anto, ebla, ema, ilo, eti, igi; inciti la fajron.</b> AFHI.	<i>exciter, agacer, irriter.</i>



<b>Inciziv'o</b>	antaŭa dento difinita por eltranĉi. AFHI.	<i>incisive.</i>
<b>IND'A</b>	merita, meritanta; uzata kiel sufikso por devenigi adjektivojn el verbaj radikoj kun la senco kiu meritas esti, ekz : <b>aprobinda, laŭdinda, ridinda</b> ; — <b>aĵo, eco, ulo, umi, igi, iĝi; sen, mal'inda.</b>	<i>digne, de qui mérite.</i>
<b>Indeks'o</b>	alfabeta tabelo, katalogo, registro, k. t. p. AFGHI.	<i>index.</i>
<b>Indian'o</b>	amerika sovaĝulo.	<i>indien.</i>
<b>Indic'o</b>	(mat.) koeficiento, aldona supercifero. FHI.	<i>indice.</i>
<b>Indien'o (WD.)</b>	speco de kotonaĵo. FHI.	<i>indienne, calicot.</i>
<b>INDIFEREN - T'A</b>	seninteresa, sendiferenca, negrava; — <b>eco, ema, ulo, esti indiferenta pri.</b> AFGHIR.	<i>indifférent.</i>
<b>INDIG'O</b>	blukolorigilo el samnoma kreskaĵo fabaco ( <i>indigofera</i> ). V. <b>anelo.</b> AFGHIR.	<i>indigo.</i>
<b>INDIGN'I</b>	ekkoleri pri maljustaĵo; — <b>inda, ema, igi,</b> A FHIR.	<i>s'indigner.</i>
<b>INDIGOT'O ? (V.)</b>	(bot.) V. <b>indigo</b>	<i>indigo.</i>
<b>Indigotin'o (V.)</b>	(kem.) koloriga principo de la indigo.	<i>indigotine.</i>
<b>Indiĝen'o</b>	enlandulo, landido. AFHI.	<i>indigène.</i>
<b>INDIK'I ?</b>	montri, konigi. AFHI.	<i>indiquer.</i>
<b>Indikativ'o</b>	(gram.) modo de la verboj por aserti, montri. A FGI.	<i>indicatif.</i>
